

"La Zagreba metodo"

Enhavo

Enkonduko

Superrigardo

Gravaj esprimoj

Lecionoj: Novaj vortoj, Gramatika klarigo, Teksto, Ekzerco



Multlingva paĝaro por informiĝi kaj lerni Esperanton

Enkonduko

La Zagreba metodo estas metodo instrui Esperanton en la unua fazo. Nur por komencantoj. En fino de sepdekaj jaroj en Internacia Kultura Servo en Zagrebo ni konstatis, ke malbonajn rezultojn en instruado de infanoj ni havis ĉefe pro lernolibroj, kiuj estis adaptoj de nacilingvaj lernolibroj por lerni naciajn fremdlingvojn. Ni decidis ellabori novan lernilon, kiu baziĝos je Esperanto mem. Unue Zlatko Tišljar ellaboris oftecvortaron baze de parola lingvo, en kiu ni konstatis, ke nur proksimume 500 morfemoj (radikoj + gramatikaj finaĵoj) kovras 95% de la parolata teksto. Tiam la grupo el 4 aŭtoroj ricevis la taskon ellabori lernolibron baze de tiu ofteclisto. La unua versio estis preta en 1979, la dua en 1980. Post elprovadoj kaj sugestoj de multaj instruistoj ni plibonigadis la lernolibron en pliaj tri kroataj eldonoj. Fine ĝi estis tia kia nun. Ĝis nun aperis 8 kroataj eldonoj kun pli ol 50.000 ekzempleroj kaj adaptoj al 26 lingvoj.

Ĝia baza valoro estas, ke oni ne instruas en la komenco balastajn vortojn kaj gramatikon, sed nur tion, kio en la vivo estas nepre necesa. Tial la materialo instruata en la unuaj du lecionoj jam ebligas al ĉiu lernanto mem krei frazojn necesajn por paroli pri la plej elementaj bezonoj, do ĝi stimulas kreadon de la komenco mem.

Bonan amuzon kaj seriozan laboron! 😊

La aŭtoroj: Zlatko Tišljar, Spomenka Štimec, Ivica Špoljarec, Roger Imbert.

Superrigardo

La kurso konsistas el 12 lecionoj:

- Leciono 1 - Amiko Marko
- Leciono 2 - La amikino de Marko
- Leciono 3 - En kafejo
- Leciono 4 - Miaj leteroj
- Leciono 5 - Nova aŭto
- Leciono 6 - Maja
- Leciono 7 - Ĉiam malfrue
- Leciono 8 - Malbela tago
- Leciono 9 - Plano pri veturado
- Leciono 10 - Familianoj kunvenas
- Leciono 11 - La sentimulo
- Leciono 12 - Nokta promeno



Gravaj esprimoj

Jen kelkaj gravaj kaj utilaj esprimoj:

ĉu ne?	-	ĉu ne?
iom post iom	-	iom post iom
pli-malpli	-	pli-malpli
memkompreneble	-	memkompreneble
temas pri	-	temas pri
iomete	-	iomete
rilate al	-	rilate al
ni diru	-	ni diru
verŝajne	-	verŝajne
eble	-	eble

Leciono 1 - Amiko Marko

Novaj vortoj:

amiko	-	amiko	aŭ	-	aŭ
ĉambro	-	ĉambro	de	-	de
en	-	en	esti	-	esti
ĝi	-	ĝi	hotelo	-	hotelo
ili	-	ili	instrui	-	instrui
jes	-	jes	kaj	-	kaj
kio	-	kio	kiu	-	kiu
la	-	la	labori	-	labori
lernanto	-	lernanto	lerni	-	lerni
li	-	li	libro	-	libro

lingvo	- lingvo	mi	- mi
ne	- ne	ni	- ni
nomo	- nomo	nun	- nun
papero	- papero	patro	- patro
respondi	- respondi	seĝo	- seĝo
sidi	- sidi	skribi	- skribi
sporto	- sporto	sur	- sur
ŝi	- ŝi	tablo	- tavolo
vi	- vi		-

Gramatikaj klarigoj por leciono 1

Bonvolu tre atente trastudi la klarigojn.

1- alfabeto kaj maniero legi:

Elparolo

Oni skribas kaj elparolas Esperanton tute regule/fonetike. Ĉiu litero ĉiam elparoliĝas sammaniere.

La alfabeto

A B C Ĉ D E F G Ĝ H Ĥ I J Ĵ K L M N O P R S Ŝ T U Ŭ V Z | La tuta alfabeto

Vokaloj

Litero	Sonklarigo	Vortekzemplo
<u>A</u>	-	<u>ami</u> - ami
<u>E</u>	-	<u>egala</u> - egala
<u>I</u>	-	<u>infano</u> - infano
<u>O</u>	-	<u>oro</u> - oro
<u>U</u>	-	<u>urbo</u> - urbo

Konsonantoj

Litero	Sonklarigo	Vortekzemplo
<u>B</u>	-	<u>bela</u> - bela
<u>C</u>	-	<u>celo</u> - celo
<u>Ĉ</u>	-	<u>ĉokolado</u> - ĉokolado
<u>D</u>	-	<u>doni</u> - doni
<u>F</u>	-	<u>facila</u> - facila
<u>G</u>	-	<u>granda</u> - granda
<u>Ĝ</u>	-	<u>ĝui</u> - ĝui
<u>H</u>	-	<u>horo</u> - horo
<u>Ĥ</u>	-	<u>ĥoro</u> - ĥoro
<u>J</u>	-	<u>juna</u> - juna
<u>Ĵ</u>	-	<u>ĵurnalo</u> - ĵurnalo
<u>K</u>	-	<u>kafo</u> - kafo
<u>L</u>	-	<u>lando</u> - lando
<u>M</u>	-	<u>maro</u> - maro
<u>N</u>	-	<u>nokto</u> - nokto
<u>P</u>	-	<u>paco</u> - paco
<u>R</u>	-	<u>rapida</u> - rapida
<u>S</u>	-	<u>salti</u> - salti
<u>Ŝ</u>	-	<u>ŝipo</u> - ŝipo
<u>T</u>	-	<u>tago</u> - tago
<u>Ŭ</u>	-	<u>aŭto</u> - aŭto
<u>V</u>	-	<u>vivo</u> - vivo
<u>Z</u>	-	<u>zebro</u> - zebro

Diftongoj

La sono/litero 'ŭ' estas uzata nur tuj post 'a', 'e' aŭ 'o'. Kun a/e/o kaj akompanantaj konsonantoj, ĝi formas unu silabon. Atentu pri la prononc-diferenco en la sekva ekzemplo:

[aŭto](#) - aŭto, [auto](#) - neekzistanta vorto

2- akcentado:

La akcento ĉiam estas sur la antaŭlasta vokalo de la vorto: [vojo](#) , [kantado](#) , [apud](#) , [historio](#) , [aŭdi](#) , [ilia](#)

3- artikolo (la):

"La" estas la difinita artikolo. Ĝia formo neniam ŝanĝiĝas.

la hundo - **la hundo**

la domo - **la domo**

la knabo - **la knabo**

la tablo - **la tablo**

- Nedifinita artikolo ne ekzistas.

hundo - **hundo, iu hundo**

domo - **domo, iu domo**

4- substantivo (o):

Substantivo estas nomo de aĵoj aŭ aferoj. Substantivo respondas al la demando "Kio ĝi (ŝi, li) estas?". Ekzemple: "homo", "ideo", "nomo" kaj "domo".

5- pluralo (j):

Pluralo signas ke temas pri pli ol unu afero. Ekzemple: "homoj", "ideoj", "belaj", "bonaj", "tiumj".

6- personpronomoj (mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili):

Pronomo estas vorteto, kiu povas anstataŭi tutan substantivan frazparton

mi	mi	ni	ni
vi	vi	vi	vi
li	li	ili	ili
ŝi	ŝi		
ĝi	ĝi		

7- posedpronomoj (mia, via, lia, ŝia, ĝia, nia, via, ilia):

Se oni aldonas la finaĵon "A" al personaj pronomoj, oni kreas posedajn pronomojn:

mia	mia	nia	nia
via	via	via	via
lia	lia	ilia	ilia
ŝia	ŝia		
ĝia	ĝia		

8- infinitivo (i)

Infinitivo estas verbo kun I-finaĵo. Tia verbo ne rolas kiel predikato, sed havas diversajn aliajn rolojn en frazoj.

Verbformoj

Finaĵo	Klarigo	Ekzemplo
-i	bazformo (infinitivo)	esti - esti skribi - skribi

Kompleksaj verbkonstruoj

Kompleksaj verbkonstruoj konsistas el ĉefverbo kaj samsubjekta verbo, kiu ĉiam havas bazan formon. Kutime tiaj kompleksaj verbkonstruoj estas uzataj por la verboj **povi**, **devi** kaj **voli**.

9- prezenco (as):

Prezenca verbo, verbo kun AS-finaĵo, montras, ke la ago aŭ stato estas reala, efektiva, kaj ke ĝi komenciĝis, sed ne finiĝis. Tio signifas, ke la ago aŭ stato okazas ĝuste nun, aŭ ke ĝi okazas kutime, aŭ ke la afero validas ĉiam:

<i>laboras</i>	=	<i>laboras</i>
<i>estas</i>	=	<i>estas</i>
<i>Mi sidas sur seĝo.</i>	=	<i>Mi sidas sur seĝo.</i>
<i>Mi estas advokato.</i>	=	<i>Mi estas advokato.</i>
<i>Kvar kaj dek ok faras dudek du.</i>	=	<i>Kvar kaj dek ok faras dudek du.</i>
<i>Nun mi legas.</i>	=	<i>Nun mi legas.</i>

<i>Hodiaŭ mi studas Esperanton.</i>	=	<i>Hodiaŭ mi studas Esperanton.</i>
<i>En la vintro oni hejtas la fornojn.</i>	=	<i>En la vintro oni hejtas la fornojn.</i>
<i>Mi loĝas ĉi tie tri jarojn.</i>	=	<i>Mi loĝas ĉi tie tri jarojn.</i>

10- la verbo "esti"

"Estas" (= **estas**) estas iusence baza verbo, havas subjekton kaj ne objekton, sed povas montri kio aŭ kia io estas, kaj kiel io okazas.

Mi **estas** advokato = **Mi estas** advokato Ŝi estas forta." (= **Ŝi estas** forta.)

11- la demandovortoj "ĉu", "kio" kaj "kiu"

La vorto "ĉu" estas i.a. uzata por krei demandojn kiuj havas jes/ne-respondon. Ekzemple: "Ŝi estas forta." (= **Ŝi estas** forta.) - "Ĉu ŝi estas forta?" (= **Ĉu ŝi estas** forta?). "Kio" (= **kio**) kaj "Kiu" (= **kiu**) estas tre oftaj en demandoj.

12- la respondovortoj "jes" kaj "ne"

Pozitiva respondvorto (al "ĉu"-demando) estas "jes" (=jes), negativa estas "ne" (=ne).

13- la sufikso -ist-

IST = "persono, kiu ofte okupiĝas pri io (eble profesie)". Tio, kio staras antaŭ IST, ĉiam estas tio, pri kio okupiĝas la persono.

Estas ofta miskompreno, ke IST egalas al "profesiulo", sed ĝia vera signifo estas pli vasta:

<i>verki</i>	<i>verki</i>	→	<i>verkisto</i>	<i>verkisto</i>
<i>kuraci</i>	<i>kuraci</i>	→	<i>kuracisto</i>	<i>kuracisto</i>
<i>arto</i>	<i>arto</i>	→	<i>artista</i>	<i>artista</i>
<i>biciklo</i>	<i>biciklo</i>	→	<i>biciklisto</i>	<i>biciklisto</i>
<i>ŝteli</i>	<i>ŝteli</i>	→	<i>ŝtelisto</i>	<i>ŝtelisto</i>
<i>Esperanto</i>	<i>Esperanto</i>	→	<i>Esperantisto</i>	<i>Esperantisto</i>

14- la sufikso -in-

IN = "la naskopova sekso". La sufikson IN oni povas uzi nur ĉe io, kio povas havi sekson, nome homo aŭ besto. IN aldonas in-seksan signifon (kaj forprenas eventualan virseksan signifon).

Oni povas aldoni IN al vorto, kiu estas sekse neŭtra. La vorto tiam ekhavas in-seksan signifon:

<i>aŭtoro</i>	<i>aŭtoro</i>	→	<i>aŭtorino</i>	<i>aŭtorino</i>
<i>pasaĝero</i>	<i>pasaĝero</i>	→	<i>pasaĝerino</i>	<i>pasaĝerino</i>
<i>sinjoro</i>	<i>sinjoro</i>	→	<i>sinjoinro</i>	<i>sinjoinro</i>
<i>viro</i>	<i>viro</i>	→	<i>virino</i>	<i>virino</i>
<i>vidvo</i>	<i>vidvo</i>	→	<i>vidvino</i>	<i>vidvino</i>

Leciono 1 - Amiko Marko

Marko estas mia amiko. Li estas lernanto kaj sportisto. Li nun sidas en ĉambro kaj lernas. Sur tablo estas paperoj kaj libroj. Ĝi estas skribotablo. La libroj sur la tablo estas lernolibroj.

La patro kaj la patrino de mia amiko ne estas en la ĉambro. Ili nun laboras. Lia patro estas laboristo, li laboras en hotelo. La patrino instruas. Ŝi estas instruistino.



Leciono 2 - La amikino de Marko

Novaj vortoj:

al	al	ami	ami
ankaŭ	ankaŭ	ankoraŭ	ankoraŭ
bela	bela	bona	bona
bonvolu	bonvolu	dankon	dankon
demandi	demandi	diri	diri
doni	doni	facila	facila
fari	fari	frato	frato
granda	granda	havi	havi
hejme	hejme	iri	iri
jen	jen	juna	juna
kafo	kafo	ke	ke
kia	kia	kuiro	kuiro
kun	kun	legi	legi
mono	mono	nova	nova
nur	nur	okulo	okulo
paroli	paroli	povi	povi
pri	pri	rigardi	rigardi
saluton	saluton	se	se
sed	sed	ŝati	ŝati
tre	tre	trinki	trinki
varma	varma	veni	veni
vidi	vidi	voli	voli

Gramatikaj klarigoj, por leciono 2

Bonvolu tre atente trastudi la klarigojn.

1- adjektivoj (a)

Adjektivo priskribas substantivon. Adjektivo respondas al la demando "Kia ĝi (ŝi, li ktp.) estas?" Ekzemple: "bela", "bona", "longa" kaj "granda".

granda	granda
juna	juna
ruĝa	ruĝa

skriba skriba

2- akuzativo (n)

Objekto montras tion, kio estas rekte trafata de ago. Ekzemple, por la frazo "La knabo skribas leteron." oni povas demandi al si mem "Kio okazas? Estas iu kiu skribas." **Kiu skribas?** - La knabo skribas. Do, "la knabo" estas la **subjekto**, la aganto. **Kion skribas la knabo?** - La knabo skribas leteron. Do, "letero" estas **objekto**, tio kio estas rekte trafata de ago.

La finaĵo **-n** indikas objekton. Oni metas **-n** fine de la vorto kiu indikas objekton de ago.

La knabo vidas la hundon. - **la knabo vidas la hundon.**

La hundo vidas la knabon. - **la hundo vidas la knabon.**

La knabo la fiŝon manĝas. - **La knabo la fiŝon manĝas.**

La knabon la fiŝo manĝas. - **La knabon la fiŝo manĝas.**

-n oni metas ankaŭ fine de adjektivoj.

La knabo havas belan hundon. - la knabo havas belan hundon

-n oni metas post la pluralofinaĵo **-j**.

La hundo vidas la belajn katojn. - la hundo vidas la belajn katojn

3- vortordo

En Esperanto la ĉefa regulo de vortordo estas komprenebleco. Oni metu la vortojn en tia ordo, ke la senco estas klara. La diversaj finaĵoj, precipe N, ebligas grandan liberecon, sed la libereco ne estas absoluta.

Mi estas esperantisto.

Esperantisto mi estas.

Estas mi esperantisto.

Estas esperantisto mi.

Mi esperantisto estas.

Esperantisto estas mi.

4- pasinta tempo (is)

Preterita verbo, verbo kun IS-finaĵo, montras, ke la ago aŭ stato estas reala, sed okazis iam antaŭ la momento de parolado. Normale la ago aŭ stato jam finiĝis:

laboris (= laboris), estis (= estis), Mi **sidis** tiam sur seĝo (= **Mi sidis tiam sur seĝo**)

Mi **estis** knabo (= **Mi estis knabo**), Hieraŭ mi **renkontis** vian filon

Mi **loĝis** ĉi tie tri jarojn. Mia loĝado daŭris tri jarojn, sed ne plu daŭras. (**Mi loĝis ĉi tie tri jarojn. Mia loĝado daŭris tri jarojn, sed ne plu daŭras.**)

5- futuro (os)

Futura verbo, verbo kun OS-finaĵo, montras, ke la ago aŭ stato ankoraŭ ne komenciĝis en la momento de parolado. Kompreneble la estonteco ĉiam estas necerta, sed futuro montras, ke la parolanto pensas, ke la afero vere okazos:

- *laboros* = la ago "labori" ankoraŭ ne komenciĝis sed ja komenciĝos
- *estos* = la stato "esti" ankoraŭ ne komenciĝis, sed post iom da tempo ĝi realiĝos
- *Mi sidos poste sur seĝo*. La sidado efektive okazos poste.
- *Mi estos riĉulo*. La riĉula stato estas fakto de la estonteco.
- *Mi rakontos al vi historion*. La rakontado ankoraŭ ne komenciĝis.
- *Morgaŭ estos dimanĉo*.
- *Mi loĝos ĉi tie tri jarojn*. Mia loĝado ankoraŭ ne komenciĝis, sed kiam ĝi komenciĝos, ĝi efektive daŭros tri jarojn.

6- ke

"Ke" (=ke) estas uzata i.a. en subfrazoj. Ekzemple: "Mi vidis, ke ŝi amas lin." (= **Mi vidis, ke ŝi amas lin.**)

7- keklaj afablovortoj: (bonvolu, saluton, dankon)

Se vi volas esti afabla, vi ofte uzu: "bonvolu" (=bonvolu), "saluton" (=saluton) kaj "dankon" (=dankon). Ekzemploj: "Bonvolu doni al mi la panon." (= **Bonvolu doni al mi la panon.**), "Saluton amikoj!" (= **Saluton amikoj!**) kaj "Dankon pro via mesaĝo!" (= **Dankon pro via mesaĝo!**).

8- la demandovortoj "kia", "kian", "kiaj" kaj "kiajn"

"Kia" (=kia) estu uzata kiam oni volas demandi pri kvalito aŭ stato. Ekzemple: "-Kia estas la kafo? -La kafo estas varma." (= **Kia estas la kafo? La kafo estas varma.**), "-Kiaj estas viaj fratoj? -Miaj fratoj estas bonaj." (= **Kiaj estas viaj fratoj? Miaj fratoj estas bonaj.**), "-Kian hundon vi havas? -Mi havas grandan hundon." (= **Kian hundon vi havas? Mi havas grandan hundon.**)

9- la prefikso mal-

MAL = "la rekte kontraŭa ideo". MAL estas uzebla nur ĉe vortoj, por kiuj ekzistas rekta kontraŭo.

- *bona* → *malbona*
- *granda* → *malgranda*
- *feliĉa* → *malfeliĉa*
- *laborema* → *mallaborema*
- *graso* → *grasa* → *malgrasa* = havanta malmulte da graso
- *pli* → *malpli*
- *tro* → *maltro*
- *fermi* → *malfermi*
- *ami* → *malami*
- *ŝlosi* → *malŝlosi*
- *aliĝi* → *malaliĝi*
- *kodo* → *kodi* → *malkodi* = deĉifri koditan tekston
- *antaŭ* → *malantaŭ*
- *supre* → *malsupre*
- *simetrio* → *malsimetrio*
- *amiko* → *malamiko*
- *lumo* → *mallumo*

10- la prefikso ge-

GE = "ambaŭ seksoj". GE estas uzata ĉe viraj kaj sekse neŭtraj vortoj por doni al ili ambaŭseksan signifon.

GE plej ofte montras paron:

- *patro* → *gepatroj* = patro kaj patrino (de komunaj infanoj)
- *edzo* → *geedzoj* = edzo kaj lia edzino
- *fianĉo* → *gefianĉoj* = fianĉino kaj ŝia fianĉo
- *doktoro* → *gedoktoroj* = doktoro kaj ties edz(in)o (*gedoktoroj* logike devus esti paro, en kiu ambaŭ estas doktoroj — tial oni nuntempe apenaŭ uzas vortojn kiel *gedoktoroj* pri paro)

GE ankaŭ estas uzata ĉe parencovortoj por montri grupon de parencoj el ambaŭ seksoj:

- *frato* → *gefratoj* = fratino(j) kaj frato(j)
- *filo* → *gefiloj* = filo(j) kaj filino(j)

Leciono 2 - La amikino de Marko

Marko havas amikino. Ŝia nomo estas Ana. Ŝi estas juna kaj bela. Ana kaj Marko estas geamikoj.

Ana venis al la hejmo de Marko.

- Bonvolu eniri, amikino.

- Saluton Marko. Kion vi faras?

- Saluton. Mi legis, sed nun mi volas paroli kun vi.

- Ĉu vi havas bonan libron?

- Jes, mi havas. Mi ŝatas legi nur bonajn librojn. Ĉu vi volas trinki kafon?

- Jes. Ĉu viaj gepatroj kaj gefratoj estas en via hejmo?

- Ne. Jen la kafo, ĝi estas ankoraŭ varma. Mi nun kuiris ĝin.

- Dankon. Mi povas trinki ankaŭ malvarman kafon.

Marko rigardis la belajn okulojn de Ana. Mi vidas, ke li amas ŝin.



Gramatikekzerco, por leciono 2

Via tasko estas enmeti vortojn aŭ vorterojn en la malplenajn lokojn. Vi devas elekti inter tiuj kiuj sekvas post "Vort(er)oj:".

Vorteroj: **on, al, ke, n, ge, ajn**

1) Marko havas amik... kaj amikin... .
Ili estas ...amikoj.

2) Li kuiras kaf... kaj ili trinkas ĝi... en
nia hejmo.

3) Ili iras ... la hotelo.

4) Ŝi vidas ... Marko amas ŝi... .

5) Ili havas facil... lernolibroj... .

Leciono 3 - En kafejo

Novaj vortoj

afero	afero	alia	alia
antaŭ	antaŭ	aŭ	aŭ
cent	cent	denove	denove
fine	fine	fino	fino
forta	forta	guldeno	guldeno
ĝoja	ĝoja	ho	ho
kanti	kanti	kelnero	kelnero
kie	kie	kiel	kiel
kompreni	kompreni	kuko	kuko
loko	loko	longe	longe
manĝi	manĝi	multe	multe
nu	nu	okazi	okazi
per	per	porti	porti
post	post	rapida	rapida
riĉa	riĉa	scii	scii
sen	sen	serĉi	serĉi
strato	strato	sufiĉa	sufiĉa
suko	suko	tago	tago
tra	tra	unu	unu
vizaĝo	vizaĝo	voĉo	voĉo

Gramatikaj klarigoj, por leciono 3

Bonvolu tre atente trastudi la klarigojn.

1- adverboj (-e)

Adverboj priskribas verbon, adjektivon, adverbon aŭ tutan frazon. Ekzemploj de adverboj: "bele", "longe" kaj "hieraŭ".

2- diferenco inter adjektivoj kaj adverboj

La finaĵon **-a** havas adjektivo. Adjektivo rilatas al substantivo kaj indikas kvaliton aŭ econ. Ĝi respondas al la demando "kia?" kaj deklinaciigas kiel la substantivo, al kiu ĝi rilatas.

La finaĵon **-e** havas adverbo. Ĝi precizigas verbojn, adjektivojn kaj aliajn adverbojn laŭ la maniero, loko, cirkonstanco ktp. kaj respondas al la demandoj "kie?", "kiel?", "kiam?".

La diferenco inter adjektivo kaj adverbo estas tio, ke adjektivo povas rilati nur al substantivo (aŭ al substantivo kaj verbo samtempe), dum adverbo rilati al substantivo **NE** povas!

Ekzemploj

Ŝia rakonto estas interesa. - **Ŝia rakonto estas interesa.**

Ŝi rakontas interese. - **Ŝi rakontas interese.**

Tio estas bona. - **Tio estas bona.**

Estas bone. - **Estas bone.**

3- imperativo (u)

Volitiva verbo, verbo kun U-finaĵo, montras, ke la ago aŭ stato ne estas reala, sed dezirata, volata, ordonata aŭ celata. Volitivo ne montras la tempon de la ago. Tia ago tamen kutime troviĝas en la estonteco:

- *laboru* = la ago "labori" estas dezirata, petata, ordonata aŭ celata
- *estu* = la stato "esti" estas dezirata, petata, ordonata aŭ celata
- **Sidu** sur seĝo! Ordono aŭ peto.
- **Estu** viro! Ordono aŭ peto.
- *Ludoviko, donu* al mi panon.
- *Ni legu* la unuan ĉapitron. Esprimo de deziro.
- *Ĉu ni iru* al la dancejo? Demando pri volo. La efektiva senco de tia frazo tamen plej ofte estas ĝentila propono. Komparu kun ĝentilaj petoj ĉi-poste.

Ĉe volitivo oni tre ofte forlasas la subjekton, se ĝi estas la pronomo *vi*: *Venu tuj!* = **Vi** *venu tuj!* Sed tia forlaso eblas nur en ĉeffrazo, ne en subfrazo.

Volitivo en ke-frazoj

Volitivo estas uzata en ke-frazoj, se la ĉeffrazo iel montras volon, celon, opinion k.s.:

- *Mi volas, ke vi laboru.* La laborado estas volata.
- *Li petas, ke mi estu atenta.*
- *Estas necese, ke ni nun unu fojon por ĉiam faru finon al tiu ĉi stato.*

4- kun / per

KUN indikas akompanon kaj signifas "kun, ne sen, kune, ne aparte, ne dise".

PER indikas rimedon, ilon aŭ objekton, helpe de kiu okazas iu ago, aŭ kiun oni uzas por atingi iun celon aŭ rezulton. Ĝi signifas "per, helpe de, kun helpo de".

- Dividi biciklon **kun** sia najbaro. - **Dividi biciklon kun sia najbaro.**
- Dudek dividite **per** kvar egalas kvin. - **Dudek dividite per kvar egalas kvin.**
- **Pri** tio mi ne volas disputi. - **Pri tio mi ne volas disputi.**
- Pli bone ne disputi **kun** li **pri** tio. - **Pli bone ne disputi kun li pri tio.**
- Oni vivas ne **kun** mono, sed **kun** persono. - **Oni vivas ne kun mono, sed kun persono.**
- **Per** mono ne ĉion eblas aĉeti. - **Per mono ne ĉion eblas aĉeti.**

5- la sufikso -ul-

UL = "persono kun ia karakterizo". Tio, kio staras antaŭ UL, ĉiam montras tion, kio karakterizas la personon.

- *juna* → *junulo* = persono karakterizata de juneco
- *dika* → *dikulo* = persono aparte dika
- *fremda* → *fremdulo* = persono de fremda lando, regiono, urbo k.t.p.
- *sankta* → *sanktulo* = persono aparte sankta
- *blanka* → *blankulo* = homo el la tiel nomata blanka raso
- *timi* → *timulo* = persono, kiu ofte timas, timemulo
- *ĝibo* → *ĝibulo* = persono kun karakteriza ĝibo
- *miliono* → *milionulo* = persono, kiu posedas miliono(j)n da dolaroj/eŭroj/enoj...
- *sen kuraĝo* → *senkuraĝulo* = persono, al kiu mankas kuraĝo
- *antaŭ* → *antaŭulo* = persono, kiu ekzistis aŭ agis antaŭe
- *alia* → *aliulo* = alia persono

6- la sufikso -ej-

EJ = "loko, spaco, domo, ĉambro k.s. destinita por io". Tio, kio staras antaŭ EJ, ĉiam estas tio, kio okazas aŭ troviĝas en la loko.

- *lerni* → *lernejo* = loko destinita por lernado
- *dormi* → *dormejo* = ĉambro por dormado
- *eliri* → *elirejo* = loko (normale pordo), tra kiu oni povas eliri
- *redakti* → *redaktejo* = loko, kie oni redaktas (ekz. gazeton)
- *akcepti* → *akceptejo* = loko, kie oni estas akceptata (en hotelo, kongreso k.s.)
- *necesa* → *necesejo* = loko por certa necesa agado, kiun oni preferas ne rekte diri (nome urinado kaj fekado)
- *preĝi* → *preĝejo* = loko por preĝado kaj aliaj religiaj agadoj. La vorto *preĝejo* estas tradicie uzata precipe por Kristana preĝejo, dum oni preferas specialajn vortojn por preĝejoj de aliaj religioj: *moskeo*, *sinagogo*, *templo* k.a. Sed *preĝejo* ja povas esti uzata por ĉia religio. Por Kristana preĝejo ekzistas ankaŭ la speciala vorto *kirko* (tre malofte uzata). Plej simple oni tamen precizigas per: *Kristana preĝejo*, *Islama preĝejo*, *Hinduisma preĝejo* k.t.p.
- *ĉevalo* → *ĉevalejo* = loko (domo) por ĉevaloj

7- la sufikso -ebl-

EBL = "povas esti farata". Oni povas uzi EBL nur ĉe transitivaj verboj:

- *manĝi* → *manĝebla* = tia, ke ĝi povas esti manĝata
- *nombri* → *nombrebla* = tia, ke ĝi povas esti nombrata
- *malhavi* → *malhavebla* = tia ke oni povas ĝin malhavi, nenecesa → *nemalhavebla* = tia ke oni ne povas ĝin malhavi, necesa
- *kompreni* → *kompreneble* = tiel, ke ĉiu ajn povas kompreni, memklare, memevidente (ofte uzata kiel mallongigo de *memkompreneble*)
- *espero* → *espereble* = tiel, ke oni povas esperi la aferon
- *supozi* → *supozeble* = tiel, ke oni povas supozi la aferon

Leciono 3 - En kafejo

Ana kaj Marko longe parolis antaŭ la lernejo. Poste ili ĝoje iris tra la strato. Estis varma tago. Ili vidis kafejon kaj en ĝi kukojn.

- Ni eniru kaj manĝu - diris Marko.
- Ĉu vi havas sufiĉan monon?
- Kompreneble, mi havas cent eŭrojn.
- Ho, vi estas riĉa!

La kelnero alportis multajn kukojn. Ili manĝis kaj post la manĝo la kelnero denove venis.

Marko serĉis en unu loko... serĉis en alia... Lia vizaĝo estis malĝoja. Fine li diris per malforta voĉo:

- Mi ne havas monon.
- Kio okazis poste? Ĉu vi scias?



Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj en Esperanto

1. antaŭĉambro

2. malamiko

3. malantaŭ

4. maljunulino

5. antaŭvidi

6. malrapida

7. trarigardi

8. gejunuloj

9. alporti

10. belulo

11. junulo

12. trinkejo

13. malmulte

Tradukoj / Klarigoj

13

finfine

at long last, at last

at long last, at last

11

trinkejo

bar, pub

bar, pub

15

tagmango

lunch

lunch

14

malriculo

poor person

poor person

17

malnova

old (opposite of new)

old (opposite of new)

8

alporti

to fetch, bring

to fetch, bring

2

malantaŭ

behind, after

behind, after

12

malmulte

little, not much

little, not much

6

trarigardi

to look through

to look through

10

junulo

young person

young person

16

tralegi

to read through

to read through

4

antaŭvidi

to foresee

to foresee

20

trinkebla

drinkable

drinkable

18

laborejo

workplace

14. finfine	<input type="checkbox"/> workplace	7	gejunuloj	young people of k
15. malriĉulo	<input type="checkbox"/> young people of both genders	9	belulo	
	<input type="checkbox"/> attractive person			
16. tagmanĝo	<input type="checkbox"/> attractive person	3	maljunulino	old woman, gamr
17. tralegi	<input type="checkbox"/> old woman, gammer	1	malamiko	
	<input type="checkbox"/> enemy			
18. malnova	<input type="checkbox"/> enemy	5	malrapida	slow
19. laborejo	<input type="checkbox"/> slow	0	antaucambro	antechamber, fro
20. travidebla	<input type="checkbox"/> antechamber, front room	19	travidebla	
	<input type="checkbox"/> transparent			
21. trinkebla	<input type="checkbox"/> transparent			

Leciono 4 - Miaj leteroj

Novaj vortoj

aŭdi	aŭdi	ĉe	ĉe
dek	dek	devi	devi
du	du	el	el
fali	fali	fariĝi	fariĝi
fermi	fermi	foto	foto
inter	inter	kapo	kapo
kiam	kiam	kien	kien
kiom	kiom	koleri	koleri
kvar	kvar	kvin	kvin
lasta	lasta	leciono	leciono
letero	letero	mano	mano
meti	meti	mil	mil
montri	montri	nacio	nacio
naŭ	naŭ	ok	ok
oni	oni	pardoni	pardoni
piedo	piedo	plu	plu
pordo	pordo	poŝo	poŝo
preni	preni	ricevi	ricevi
sep	sep	ses	ses
sia	sia	sola	sola

stari	stari	tie	tie
trankvila	trankvila	tri	tri
vera	vera		

Gramatikaj klarigoj, por leciono 4

Bonvolu tre atente trastudi la klarigojn.

1- numeraloj

Bazaj numeraloj Aliaj numeroj kreiĝas per kunmetado de la bazaj numeraloj.

0 - nul	11 - dek unu
1 - unu	12 - dek du
2 - du	20 - dudek
3 - tri	25 - dudek kvin
4 - kvar	237 - ducent tridek sep
5 - kvin	1983 - mil naŭcent okdek tri
6 - ses	2002 - du mil du
7 - sep	
8 - ok	
9 - naŭ	
10 - dek	
100 - cent	
1000 - mil	

Dekoj kaj centoj kunmetiĝas al unu vorto:

dudek(= dudek), tridek(= tridek), ducent(= ducent), tricent (= tricent)

Ĉio alia estu elparolata kaj skribata kiel apartaj vortoj, ankaŭ miloj:

dek unu(=dek unu), dek du(= dek du), du mil(= du mil)

La bazaj numeraloj ne fleksiĝas.

Mi vidas tri domojn. - mi vidas tri domojn

Ordaj numeraloj kreiĝas per la finaĵo -a. Ili fleksiĝas kiel adjektivoj.

unua - unua

dua - dua

deka - deka

okdek naŭa / okdek-naŭa - okdek naŭa (Eblas kaj sen streketo kaj kun streketo inter

la vortoj kiam temas pri plurvorta nombro.)

Mi skribas la unuan leteron. - **mi skribas la unuan leteron**

2- akuzativo de direkto

Direkto per -n

Post prepozicioj oni ĝenerale uzas nur la bazan vortformon sen -n.

pri la knabo - **pri la knabo**

en la domoj - **en la domoj**

al la urbo - **al la urbo**

Nur post prepozicioj kiuj indikas ne movon sed lokon, oni uzas **-n** kiam oni volas esprimi movon al tiu loko.

Hundo saltas sur la tablo. - **Hundo saltas sur la tablo.**

Hundo saltas sur la tablon - **Hundo saltas sur la tablon..**

Mi iras en la domo. - **Mi iras en la domo.**

Mi iras en la domon. - **Mi iras en la domon.**

Same post adverboj kiuj indikas lokon.

hejme - **hejme** | hejmen - **hejmen**

urbe - **urbe** | urben - **urben**

kie - **kie** | kien - **kien**

tie - **tie** | tien - **tien**

Rezulto de transformado aŭ ŝanĝado: la kato saltas sur la tablo. (=la kato saltas sur la tablo) la movo en sama loko okazas, "sur la tablo". la kato saltas **sur** la tablon. (= la kato saltas sur la tablon). La movo de alia loko direktiĝas objekton.

3- kie / kien

Pri "kie" kaj "kien"

"Kie" (=kie) oni uzas por loko, "kien" (=kien) oni uzas por direkto. Ekzemple: "-Kie vi estas? -Mi estas hejme." (= Kie vi estas? Mi estas hejme.) kaj "-Kien vi iras?" -Mi iras hejmen." (=Kien vi iras? Mi iras hejmen.)

4- oni

Oni estas nedifinita pronomo, uzata kiam oni parolas pri iu ajn persono, multaj aŭ kelkaj nedifinitaj personoj, persono kies identecon oni ne volas malkaŝi k.s. **Oni** estas normale unu-nombra, sed povas ankaŭ esti multe-nombra. **Oni** tute ne montras sekson.

Oni pensas pri si mem. - Oni pensas pri si mem.

Oni kaj *onia* estas nedifinitaj pronomoj, kiuj estas uzataj, kiam oni parolas pri ĉia ajn persono, pri multaj aŭ kelkaj nedifinitaj personoj, kiam ne gravas, pri kiuj personoj temas, k.s. *Oni* estas normale singulara, sed povas ankaŭ esti plurala. *Oni* tute ne montras sekson:

- *En malbona vetero oni povas facile malvarmumi.*
- *Kiam oni estas riĉa (aŭ riĉaj), oni havas multajn amikojn.*
- *Oni diras, ke la vero ĉiam venkas.*
- *La malpura aero malsanigas onin.*
- *Kiam oni venas al tiu urbo, oni devas atenti pri la krimuloj. Ili kapablas ŝteli eĉ oniajn vestaĵojn.*
- *Ne kritiku onin, ĉar oni povas ankaŭ vin kritiki.*

La formoj *onin* kaj *onia* estas tre malofte uzeblaj en la praktiko. Pro ilia maloftegeco, kelkaj sentas ilin kiel strangajn, kaj evitas ilin.

5- si kaj sia

Si kaj *sia* estas specialaj triapersonaj pronomoj, kiujn oni en certaj okazoj devas uzi anstataŭ la ordinaraj pronomoj de la tria persono. *Si* estas jen singulara, jen plurala, depende de tio, kion ĝi reprezentas. *Si* per si mem ne montras sekson.

Ofte okazas, ke tio, kio rolas kiel subjekto, aperas ankaŭ en alia rolo en la sama frazo. Se la subjekto estas *mi*, *ni* aŭ *vi* (aŭ *ĉi*), oni simple ripetas la saman pronomon:

- *Mi lavas min.* La du *mi* estas la sama persono.
- *Mi vidas mian fraton.* *Mi* kaj *mia* montras la saman personon.
- *Ni lavas nin.* La du *ni* estas la samaj personoj.
- *Ni vidas niajn fratojn.* *Ni* kaj *nia* montras la samajn personojn.
- *Vi lavas vin.* La du *vi* estas la sama(j) persono(j).
- *Vi vidas viajn fratojn.* *Vi* kaj *via* montras la sama(j)n persono(j)n.

Sed se la subjekto estas triapersona (nek la parolanto, nek la alparolato), oni devas uzi *si* por la alia rolo. Se oni uzas ekz. *li* kaj subjekte, kaj en alia rolo, tiam temas nepre pri du malsamaj viroj. La samo validas por *ŝi*, *ĝi* kaj *ili*:

- *Ŝi vidas ŝian patrinon.* Unu virino vidas la patrinon de alia virino.
- *Ŝi vidas sian patrinon.* Unu virino vidas la propran patrinon.
- *La virino serĉas sian filon.* La virino serĉas la propran filon.

- *Li lavas lin.* Unu viro lavas alian viron.
- *Li lavas **sin**.* Unu viro lavas la propran korpon. *Li* kaj *sin* montras la saman personon.
- *Ĝi lavas ĝin.* Unu besto lavas alian beston (aŭ aĵon).
- *Ĝi lavas **sin**.* Unu besto lavas la propran korpon. *Ĝi* kaj *sin* montras la saman beston.
- *La hundo ludas per **sia** pilko.* La hundo ludas per la propra pilko.
- *Ili lavas ilin.* Unu grupo de personoj aŭ bestoj lavas alian grupon.
- *Ili lavas **sin**.* Unu grupo lavas la proprajn korpojn. *Ili* kaj *sin* montras la saman grupon.
- *La naĝintoj ne trovas **siajn** vestaĵojn.* La naĝintoj ne trovas la proprajn vestaĵojn.
- *Oni ne forgesas facile **sian** unuan amon.*

"Si" ne povas esti subjekto

Si neniam povas esti mem subjekto, nek parto de subjekto, ĉar tiam *si* reprezentus sin mem. Same *sia* ne povas esti parto de subjekto. Ne eblas frazoj kiel: **Si manĝas.** **Mi kaj si dancas.** **Petro kaj si fiŝas.** **Mia kaj sia fratoj estas samklasanoj.** **Sia edzino estis kisata de li.** Ne diru do: **Karlo kaj sia frato promenas en la parko.** Se oni dirus tian frazon, oni verŝajne intencus, ke *sia* reprezentu Karlon, sed la subjekto ja ne estas *Karlo*, sed **Karlo kaj sia frato**. Diru: *Karlo kaj lia frato promenas en la parko.* Tamen oni povas uzi *si*, se oni ŝanĝas la frazon jene: *Karlo **kun sia frato** promenas en la parko.* Nun la subjekto estas *Karlo*, kaj *sia* ĝuste reprezentas Karlon. La frazparto *kun sia frato* ne estas parto de la subjekto, sed *kun*-adjekto.

"Si" en pasiva frazo

Si kaj *sia* reprezentas la **gramatikan** subjekton. Tio validas ankaŭ en [pasivaj frazoj](#), kvankam la gramatika subjekto ne estas aganto en tiaj frazoj:

- *Ŝi estas amata de **siaj** instruistinoj.*
- *Karlo estis akompanata de Petro al **sia** domo. = ...al la domo de Karlo.*
- *Karlo estis akompanata de Petro al **lia** domo. = ...al la domo de Petro.*
- *Li sendas leteron al **sia** kuzo. → *Letero estas sendata de li al lia kuzo.* En la pasiva frazo oni ne povas diri *al sia kuzo*, ĉar tiam temus pri la kuzo de la letero.*

Subfrazo

La predikato de [subfrazo](#) havas propran subjekton. Se oni uzas *si(a)* en subfrazo, ĝi reprezentu ĉiam la subjekton de la subfrazo, neniam la subjekton de la ĉeffrazo:

- *Elizabeto rigardis la viron, kiu kombis al **si** la harojn.* La viro kombis la proprajn harojn (ne tiujn de Elizabeto). *Si* reprezentas la subjekton de *kombis*, nome *kiu* (kaj *kiu* reprezentas la viron).

- *Karlo kaj Petro diris, ke la infanoj jam vestis **sin**.* La infanoj vestis la proprajn korpojn (ne tiujn de Karlo kaj Petro).
- *Li vidis, ke la hundo ludas kun **sia** pilko.* La pilko apartenas al la hundo (la subjekto de la subfrazo).
- *Abimeleĥ, la reĝo de la Filiŝtoj, rigardis tra la fenestro, kaj vidis, ke Isaak amuziĝas kun **sia** edzino Rebeka.* Rebeka estas edzino de Isaak (la subjekto de *amuziĝas*), ne de Abimeleĥ (la subjekto de *vidis*). Se estus la edzino de Abimeleĥ, oni dirus *lia edzino*.
- *Mia avo diris, ke li tre amis **sian** patrinon.* *Sian* reprezentas la subjekton de *amis*, *li*, kiu povas esti identa al *mia avo*, sed kiu ankaŭ povas esti alia viro.

Si ne povas esti mem subjekto. Ankaŭ ne eblas uzi *si* kiel subjekton de subfrazo, nek kiel parton de la subjekto de subfrazo, kun la celo, ke *si* reprezentu la subjekton de la ĉefphrazo. Ne eblas: **Karlo diris, ke **si** venos morgaŭ.** Nek: **Karlo diris, ke **sia** frato venos morgaŭ.** Si en subfrazo ĉiam reprezentas la subjekton de la subfrazo mem. Oni devas diri: *Karlo diris, ke **li** venos...* / *ke **lia** frato venos...* Ankaŭ ne eblas: **Ŝi sentis, ke pluvas sur **sin**.** Oni devas diri: *Ŝi sentis, ke pluvas sur **ŝin**.*

[Participo kun A-finaĵo](#) estas kvazaŭ subfrazo:

- *Li ekvidis la anĝelon de la Eternulo, starantan sur la vojo kun elingigita glavo en **sia** mano.* La anĝelo estis staranta kun glavo en sia mano.
- *Karlo promenis kun virino vestita per **sia** plej bela vesto.* Ŝi estis vestita per sia plej bela vesto.

Ankaŭ komparaj esprimoj enkondukitaj de **kiel** aŭ **ol** estas kvazaŭ subfrazoj. **Si** ene de tia kompara esprimo reprezentu la subjekton de la subkomprenata verbo:

- *Ŝi amas lin kiel **sin** mem.* Ŝi amas lin, kiel ŝi amas sin mem.
- *Ŝi estas tiel saĝa kiel **sia** fratino.* Ankaŭ ŝia fratino estas saĝa.
- *Li punis ilin same kiel **siajn** fratojn.* Li punis ankaŭ siajn fratojn.
- *Ŝi amas lin pli ol **sin** mem.* Ŝi amas lin pli ol ŝi amas sin mem.
- *Li estas pli aĝa ol **lia** frato.* Lia frato estas aĝa (sed malpli).

Kompleksa postmetita epiteto aŭ suplemento de substantivo povas esti rigardata kiel subfrazo kun subkomprenata verbo. Tiam *si* povas reprezenti la subjekton de la subkomprenata verbo. Tiu subjekto estas ĉiam identa al la antaŭa substantivo. Pri tiaj frazoj la uzado estas tamen malunueca:

- *Ili vizitis muzeon faman pro **siaj** belaj pentraĵoj.* = ...*muzeon, kiu estas fama pro **siaj** belaj pentraĵoj.* La pentraĵoj apartenas al la muzeo.

- *Picasso vizitis muzeon faman pro liaj pentraĵoj.* = ...muzeon, kiu estas fama pro liaj pentraĵoj. La pentraĵoj estas de Picasso.
- *Ŝi vidis soldaton kun **sia** pafilo en la mano.* = ...soldaton, kiu staris kun sia pafilo en la mano.

6- Infinitivo

Se oni uzas *si* kune kun [infinitiva verbo](#), *si* reprezentas la **senca subjekton de la infinitivo**. Plej ofte tiu senca subjekto estas la sama kiel la subjekto de la predikato, sed ne ĉiam:

- *Ĉiu homo devas zorgi pri **si** mem.* *Si* reprezentas la subjekton de *zorgi*. Ĝi estas identa al la subjekto de *devas*.
- *La sinjoro ordonis al la servisto vesti **sin**.* La senca subjekto de *vesti* estas *la servisto*. *Sin* reprezentas la serviston.
- *La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin.* La servisto ne vestu sin mem, sed alian viron, plej verŝajne la sinjoron.

Se la senca subjekto de infinitivo ne ĉeestas en la frazo, kaj se ĝi tute ne estas grava, oni normale lasas al *si* reprezenti la subjekton de la predikato:

- *La reĝo sendis voki **sian** kuraciston.* La senca subjekto de *voki* ne ĉeestas en la frazo, kaj estas malgrava. *Sia* tial povas reprezenti la reĝon. Oni traktas *sendis voki* kiel unu verbon kun nur unu subjekto, la reĝo.
- *La reĝo sendis la serviston voki lian kuraciston.* Ĉi tie la subjekto de *voki* (la servisto) ja ĉeestas. Se oni dirus *sian kuraciston*, la servisto devus voki *sian* propran kuraciston, ne tiun de la reĝo.

Aga substantivo

Se substantivo estas klare aga, kaj se ĝia senca subjekto ĉeestas, *si* normale reprezentu tiun subjekton. La reguloj estas tamen nefiksitaj:

- *Petro pacience aŭskultis la plendadon de Karlo pri ĉiuj **siaj** problemoj.* Karlo plendis pri ĉiuj siaj problemoj. La problemoj estas de Karlo (la senca subjekto de *plendado*), ne de Petro (la subjekto de *aŭskultis*).

Kiam *sia* staras antaŭ aga substantivo kiel difinilo de ĝi, ĝi ĉiam reprezentas la subjekton de la predikato:

- *Karlo rakontis al Eva pri **sia** vojaĝo al Azio.* Karlo vojaĝis al Azio.
- *Karlo demandis al Eva pri ŝia vojaĝo al Eŭropo.* Eva vojaĝis al Eŭropo.

Si(a) en fiksitaj esprimoj

En kelkaj fiksitaj esprimoj *si(a)* ne obeas al la ordinaraj reguloj. Jen ekzemploj:

- **siatempe** = "en tiu tempo, en la koncerna tempo, en konvena tempo". Kiam *siatempe* havas tiun ĉi specialan signifon, oni diras ĉiam *siatempe* sendepende de la subjekto: *Mi volis siatempe proponi regulon. Tiam mi donos al via lando pluvon siatempe.*
- **Substantivo + en si** = "...tia, kia ĝi estas". Kiam temas pri tiu ĉi speciala signifo, oni uzas *si* eĉ se la koncerna afero ne estas subjekto: *Se oni rigardas la aferon en si, oni vidas... = Se oni rigardas la aferon tia, kia ĝi estas...*

7- la prefikso re-

RE = "veni aŭ meti denove en la saman lokon kiel antaŭe, denove fari aŭ fariĝi tia kiel antaŭe, fari aŭ okazi ankoraŭ unu fojon en sama aŭ alia maniero". RE estas uzata nur ĉe agaj vortoj, kaj ĉiam montras manieron de la ago:

- *veni* → *reveni* = veni denove al loko, kie oni estis antaŭe
- *doni* → *redoni* = doni ion al tiu, kiu antaŭe havis tion
- *brilo* → *rebrilo* = brila speguliĝo
- *bonigi* → *rebonigi* = denove bonigi ion, kio malboniĝis
- *saniĝi* → *resaniĝi* = fariĝi denove sana post malsanado
- *diri* → *rediri* = diri denove la saman aferon, diri responde
- *trovi* → *retrovi* = trovi tion, kion oni perdis
- *koni* → *rekoni* = vidi ion kaj rimarki ke oni jam konas ĝin, agnoski, konfesi la valoron de io
- *turni* → *returni* = turni denove en la antaŭan (kontraŭan) direkton

Iuj RE-vortoj ekestis pro influo de nacilingvaj vortoj, kaj havas nelogikan signifon. Ekz. *reprezenti* ordinare ne signifas "prezenti denove", sed "agi anstataŭ iu, en ies nomo". *Resumi* ne estas "denove sumi", sed "koncize esprimi la esencon". Tiujn, kaj aliajn vortojn, oni nun normale rigardas kiel nekunmetitajn (faritajn el la radikoj REPREZENT kaj RESUM). *Returni* kaj precipe *returna* kaj *returne* estis antaŭe uzataj ankaŭ pri reirado kaj redonado. Nun oni uzas tiujn vortojn nur kiam temas pri efektiva turnado.

Leciono 4 - Miaj leteroj

Marko skribis al mi belan leteron. Ĝi estis vera amletero. En la letero estis ankaŭ lia foto. Kiam mi revenis el la lernejo, mi volis ĝin denove legi. Mi rapide eniris en mian ĉambron. Tie staris mia fratino Vera antaŭ mia tablo kaj legis mian leteron. En ŝia mano estis ankaŭ la foto. Mi diris kolere:

- Kion vi faras tie? Ne legu leterojn de aliaj! Mia fratino fariĝis ruĝa. La foto falis el ŝia mano sur la tablon kaj la letero falis ankaŭ. Ŝi diris:
 - Pardonu... mi serĉis mian libron...
 - Sed vi bone scias, ke viaj libroj ne estas sur mia tablo. Ankaŭ ne en mia ĉambro! Redonu la leteron al mi.
- Ŝi ricevis bonan lecionon: ŝi ne plu legos leterojn de aliaj.
Ankaŭ mi ricevis lecionon: mi devas bone fermi la pordon de mia ĉambro.



Gramatikekzerco, por leciono 4

Via tasko estas enmeti vortojn aŭ vorterojn en la malplenajn lokojn. Vi devas elekti inter tiuj kiuj sekvas post "Vort(er)oj:"

Vorteroj: **n, sur, re, al, tra, on**

- | | | |
|----|---|--|
| 1) | Anna kaj Marko iris ... la strato. | |
| 2) | Ili venis ... kafejo, iris... tablo kaj vidis la patro... sidi ...seĝo. | |
| 3) | Anna metis kukojn sur seĝ... . | |
| 4) | Ŝi ... metis poste la kukojn sur la tabl... . | |

Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj en Esperanto	Tradukoj / Klarigoj	
	4	reiri
	to go back, return	
	to go back, return	
1. enfali	15	reveni
	to come back, return	
	to come back, return	
2. ellabori	14	revidi
	to see again	
	to see again	
3. scivola	11	
	interalie	among other things
	among other things	
4. trilingva	7	elpreni
	to remove, take out	
	to remove, take out	
5. reiri	16	internacia
	international	
	international	
6. enmeti	5	
	enmeti	to put in, insert
	to put in, insert	
7. dektaga	17	pediri
	to go on foot	
	to go on foot	
8. elpreni	6	
	dektaga	ten-day
	ten-day	
9. malfermi	9	
	eldoni	to publish, issue
	to publish, issue	
10. eldoni	10	eldonisto
	publisher	
	publisher	
11. eldonisto	2	
	scivola	curious, inquisitive

		curious, inquisitive
12. interalie	12	interparoli
		to converse
13. interparoli		to converse
		1
	elabori	to elaborate, work
14. ĉeesti		to elaborate, work out
	3	trilingva
		trilingual
15. revidi		trilingual
		8
	malfermi	to open, open up
16. reveni		to open, open up
	0	enfali
		to fall in
17. internacia		to fall in
		13
	ceesti	to attend, be present
18. piediri		to attend, be present, witness
	18	

Leciono 5 - Nova aŭto

Novaj vortoj

aŭto	aŭto	bedaŭri	bedaŭri
burokrato	burokrato	certe	certe
ĉar	ĉar	ĉi	ĉi
dum	dum	edzo	edzo
forgesi	forgesi	helpi	helpi
horo	horo	jam	jam
jaro	jaro	kial	kial
komenci	komenci	kosti	kosti
monato	monato	multekosta	multekosta

ol	ol	plaĉi	plaĉi
plej	plej	plena	plena
pli	pli	sendi	sendi
sinjoro	sinjoro	tempo	tempo
tiu	tiu	vendi	vendi
veturi	veturi	vivi	vivi

Gramatikaj klarigoj, por leciono 5

1- korelativoj

Demandovortoj kaj respondvortoj ligitaj al ili estas ordigitaj en aparta sistemo. Ĝi konsistas el kvin antaŭsilaboj kaj naŭ postsilaboj kombineblaj en diversaj manieroj.

Antaŭsilabo	Mallonga klarigo
ki-	kio, kiu, demandvorto
ti-	'indikvorto'
i-	iu
ĉi-	ĉio-, ĉiu
neni-	neniu

Postsilabo	Mallonga klarigo
-o	nedifinita aĵo
-u	individuo, difinita aĵo
-a	eco
-el	maniero
-e	loko
-am	tempo
-om	kvanto
-al	kialo
-es	posedanto

Kune ili formas tabelon:

kio - kio	tio - tio	io - io	ĉio - ĉio	nenio - nenio
kiu - kiu	tiu - tiu	iu - iu	ĉiu - ĉiu	neniu - neniu
kia - kia	tia - tia	ia - ia	ĉia - ĉia	nenia - nenia
kiel - kiel	tiel - tiel	iel - iel	ĉiel - ĉiel	neniel - neniel
kie - kie	tie - tie	ie - ie	ĉie - ĉie	nenie - nenie

kiam - kiam	tiam - tiam	iam - iam	ĉiam - ĉiam	neniam - neniam
kiom - kiom	tiom - tiom	iom - iom	ĉiom - ĉiom	neniom - neniom
kial - kial	tial - tial	ial - ial	ĉial - ĉial	nenial - nenial
kies - kies	ties - ties	ies - ies	ĉies - ĉies	nenies - nenies

Ĉi

La vorto **ĉi** esprimas proksimecon kaj estas uzata kun la *ti-* kaj *ĉi-*vortoj, aŭ antaŭ aŭ post ili.

tie ĉi / ĉi tie - ĉi tie

tiu ĉi / ĉi tiu - ĉi tiu

ĉio ĉi / ĉi ĉio - ĉi ĉio

Ajn

La vorto **ajn** signifas 'ajn':

kiam ajn - kiam ajn

kiu ajn - kiu ajn

Rilataj vortoj

La *ki-*vortoj estas uzataj ankaŭ kiel rilataj (interrilataj) vortoj.

Tio, **kion li diris, estas bona.** - tio, **kion li diris, estas bona**

La knabino, **kiu staras tie.** - la knabino, **kiu staras tie**

Ĝi estas granda **kiel domo.** - ĝi estas granda **kiel domo**

2- komparativo kaj superlativo (pli, plej, el, ol)

Komparado

Pli - pli, **plej** - plej.

granda - granda

pli granda - pli granda

plej granda - plej granda

Ankaŭ adverboj kompareblas per **pli** kaj **plej**.

rapide - rapide

pli rapide - pli rapide

plej rapide - plej rapide

La komparvorto estas **ol**.

La tablo estas pli granda ol la seĝo. - La tablo estas pli granda ol la seĝo

La elefanto estas **pli granda ol** la kuniklo. - La elefanto estas **pli granda ol** la kuniklo.

Eblas fari ankaŭ 'inversan' komparadon per **malpli** - malpli kaj **malplej** - malplej.

malpli granda - malpli granda

malplej granda - malplej granda

3- dum

dum	dum	Ni iris dum tri minutoj. - Ni iris dum tri minutoj.
-----	-----	--

Post prepozicio normale staras frazparto, al kiu la prepozicio rilatas. Sen tia posta frazparto, prepozicio ne havas sencon: *sur la tablo, en mia domo, ekster tiu ĉi ĉambro, dum la paŭzo, anstataŭ tio, krom Petro* k.t.p.

Se oni volas ellasi vortojn post prepozicio (subkompreni ilin), oni devas uzi la prepozicion kun E-finaĵo, ĉar la prepozicio tiam fariĝas propra frazparto, kiu rolas kiel adverbo:

Tio okazis dum la paŭzo. → Tio okazis dume.

4- sufikso -ind-

-ind- estas bone fari; merito **legi** - legi **leginda** - leginda

IND = "meritas aŭ valoras esti farata". Oni povas uzi IND nur ĉe transitivaj verboj:

- *ami* → *aminda* = tia ke ĝi meritas esti amata
- *vidi* → *vidinda* = tiel bela aŭ bona, ke ĝi valoras esti vidata
- *miri* → *mirinda* = tiel eksterordinara, ke oni miru ĝin (= pri ĝi)
- *bedaŭri* → *bedaŭrinde* = tiel (malbone), ke ĝi meritas bedaŭron

Leciono 5 - Nova aŭto

Sinjoro Rapid, amiko de Marko, eniris vendejon de aŭtoj. Tie li vidis belan sinjorinon, kiu plaĉis al li. Vendisto venas al li. Sinjoro Rapid demandas:

- Kiu aŭto estas la plej bona?
- Tiu ĉi estas la plej bona el ĉiuj.
- Ĉu ĝi estas rapida?
- Ĝi estas pli rapida ol aliaj.
- Ĉu ĝi estas ankaŭ forta?
- Ho jes, ĝi estas tre forta.
- Certe ĝi estas multekosta?
- Kompreneble, ĝi estas la plej multekosta el ĉiuj.
- Dankon, bedaŭrinde mi ne aĉetos novan aŭton, ĉar mia malnova aŭto estas la plej malmultekosta el ĉiuj. Mi ankoraŭ veturos per ĝi.

Dum li tion diris, li denove rigardis la belan sinjorinon. Sed la vendisto diris:

- Estos pli bone, ke vi ne rigardu tiun ĉi sinjorinon. Ankaŭ ŝi estas multekosta. Mi scias, ĉar mi estas ŝia edzo.



Gramatikekzerco, por leciono 5

Via tasko estas enmeti vortojn aŭ vorterojn en la malplenajn lokojn. Vi devas elekti inter tiuj kiuj sekvas post "Vort(er)oj:"

Vorteroj: **inda, pli, plej, ol, dum, la, inde**

1) Dankon, sinjoro. Nedank .

2) Horo estas mallonga, tago estas longa, monato estas longa el ili.

3) Mi legas pli multajn librojn mia amiko.

4) Mi sendis al mia amiko longajn leterojn li estis en Tokio.

5) La libro estas leg .

Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj Esperanto	en	Tradukoj / Klarigoj
		<input type="text"/> 12 <input type="text"/> kvarmonate <input type="text"/> four-monthly
1. sinjorino	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> four-monthly <input type="text"/> 14 <input type="text"/> nepardoninde <input type="text"/> unpardonable
2. malmultekosta	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> unpardonable <input type="text"/> 8 <input type="text"/> vendejo <input type="text"/> shop, store
3. ĉiutaga	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> shop, store <input type="text"/> 5 <input type="text"/> nuntempe <input type="text"/> currently, nowadays
4. intertempe	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> currently, nowadays, these days <input type="text"/> 1 <input type="text"/> malmultekosta <input type="text"/> inexpensive, cheap
5. plenplena	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> inexpensive, cheap <input type="text"/> 11 <input type="text"/> jarcento <input type="text"/> centennial, century
6. nuntempe	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> centennial, century <input type="text"/> 6 <input type="text"/> ĉiokaze <input type="text"/> in any event
7. ĉiokaze	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> in any event <input type="text"/> 10 <input type="text"/> ĉiujare <input type="text"/> yearly
8. malhelpi	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> yearly <input type="text"/> 4 <input type="text"/> plenplena <input type="text"/> brimming, replete
9. vendejo	<input type="checkbox"/>	<input type="text"/> brimming, replete <input type="text"/> 9 <input type="text"/> edzino <input type="text"/> wife

10. edzino wife 3 intertempe meanwhile, all the
11. ĉiujare meanwhile, all the while 2 ĉiutaga
 daily
12. jarcento daily 13 alveturi to drive to, run
13. kvarmonate to drive to, run 7 malhelpi to inhibit, hinder
14. alveturi to inhibit, hinder 0 sinjorino lady; madam, Mrs
15. nepardoninde lady; madam, Mrs.

Leciono 6 - Maja

Novaj vortoj

alta	alta	bezoni	bezoni
deziri	deziri	doktoro	doktoro
esperi	esperi	faligi	faligi
familio	familio	farti	farti
fojo	fojo	hieraŭ	hieraŭ
hodiaŭ	hodiaŭ	infano	infano
je	je	kara	kara
lando	lando	loĝi	loĝi
mateno	mateno	moki	moki
morgaŭ	morgaŭ	necesa	necesa
pensi	pensi	peti	peti
por	por	proksime	proksime

rimarki	rimarki	sana	sana
semajno	semajno	sub	sub
temperaturo	temperaturo	teo	teo
terura	terura	tuj	tuj
tuta	tuta	utila	utila
vespero	vespero	vesti	vesti
voki	voki	zorgi	zorgi

Gramatikaj klarigoj, por leciono 6

1- Pri "ke"

"Ke" (=ke) estas uzata i.a. en subfrazoj. Ekzemple: "Mi vidis, ke ŝi amas lin." (= Mi vidis, ke ŝi amas lin.)

2- Pri "ke... -u"-frazoj

Ekzemple: "Mi deziras, ke vi lernu la ĉinan." (= Mi deziras, ke vi lernu la ĉinan.)

3- Uzo de Je

Kiam neniu alia prepozicio taŭgas oni povas uzi la nedifinitan prepozicion **je**.
Li kredas **je** Dio. - li kredas je Dio

Alia kutima uzo de **je** estas en tempoesprimoj:

je la tria horo - je la tria horo

Li kredas **je** Dio – li kredas je Dio

Je estas prepozicio sen difinita signifo. La origina intenco estis, ke oni uzu *je* en ĉiuj abstraktaj okazoj, por kiuj ne ekzistas alia prepozicio. Tial en la frua tempo oni uzis *je* tre multe. Nuntempe *je* estas pli malofta, kaj montras precipe [horon](#) kaj [mezuron](#). Ĝenerale oni evitu *je*, se pli bona alternativo ekzistas.

Ofte oni povas uzi N-finaĵon anstataŭ *je*, precipe por [mezuro](#) kaj [tempopunkto](#).

Horo kaj aliaj tempopunktoj

- *Ni prenos la buson **je dudek (minutoj) antaŭ la deka (horo).***
- *Tio okazis **je Pasko.***
- ***Je la lasta fojo** mi permesas al vi fari tion.*

Mezuro

- *Vi certe estas **je duono da kapo pli alta ol mi.** = ...duonon da kapo pli alta ol mi.*

Manko, abundo kaj sopiro

- *Ŝi estas libera **je mankoj.** Aŭ ...de mankoj.*
- *Abram estis tre riĉa **je brutoj, arĝento, kaj oro.***
- *Glaso da vino estas glaso plena **je vino.** Aŭ ...plena de vino.*
- *Mi sopiras **je mia perdita feliĉo** Aŭ ...mian perditan feliĉon / ...al mia perdita feliĉo..*

Korpa aŭ anima stato

- *Ili suferas **je astmo.***
- *Ŝi gravediĝis **je ĝemeloj.***
- *Li malsaniĝis **je profunda melankolio.***

Korpoparton iel tuŝatan de preno, kapto, malsano k.s.

- *Li kaptis min **je la brako.** Je la brako montras mian brakon. Oni ankaŭ povas diri ĉe la brako. Por montri lian brakon (kiun li uzas por kapti min), oni uzu *per*.*
- *Li estis lama **je siaj ambaŭ piedoj.***

Diversaj fiksitaj esprimoj

- *Ŝi kredas **je Dio.** Kredi je iu aŭ je io = "kredi, ke tiu aŭ tio vere ekzistas". Kredi ion, al io, pri io = "kredi, ke tio estas vera". Kredi al iu = "kredi, ke tiu diras la veron".*
- ***Je mia miro** la afero sukcesis. = La afero sukcesis, kio mirigis min.*

- *Mi vetis kun ŝi je dek dolaroj.* La venkonto en la veto gajnos la dek dolarojn. Oni povas ankaŭ uzi *pri*.

4- Pri "farti"

"Farti" (=farti) signifas "senti sin". "farti x-e" = "esti en x-a stato". Ekzemple: "-Kiel vi fartas? - Mi fartas tre bone." (= Kiel vi fartas? Mi fartas tre bone.)

5- ET

ET = "(plej) malalta grado, (plej) malgranda speco".

- *domo* → *dometo* = (tre) malgranda domo
- *varma* → *varmeta* = nur iom varma
- *babili* → *babileti* = babili malmulte
- *iom* → *iomete* = nur malmulte
- *ŝtrumpo* → *ŝtrumpeto* = mallonga ŝtrumpo, kiu kovras nur la piedon kaj la parton tuj super la piedo
- *ridi* → *rideti* = ridi sensone kun fermita buŝo
- *patro* → *patreto* = kara patro, paĉjo
- *mano* → *maneto* = ĉarme malgranda mano

lafoje oni uzas ET prefiksece por montri specialan signifon:

- *burĝo* → *etburĝo* = burĝo, kies burĝeco estas eta (laŭ socia statuso)
- *fingro* → *etfingro* = speco de fingro, kiu estas kutime pli malgranda ol la aliaj fingroj sur la mano

6- EG

EG = "(plej) alta grado, (plej) granda speco".

- *domo* → *domego* = (tre) granda domo
- *varma* → *varmega* = tre varma
- *bone* → *bonege* = tre bone

- *krii* → *kriegi* = (tre) laŭte krii
- *ŝati* → *ŝategi* = tre ŝati
- *dankon!* → *dankegon!* = grandan dankon!
- *tre* → *treege* = tre tre
- *pordo* → *pordego* = ĉefa pordo de domo, urbo, bieno, korto k.s.
- *granda* → *grandega* = nenormale granda
- *piedo* → *pedego* = granda, dika, malagraba aŭ danĝera piedo de homo aŭ besto
- *manĝi* → *manĝegi* = avida aŭ troe manĝi, vori

Leciono 6 - Maja

Maja estas beleta junulino. Ĉiuj ŝiaj geamikoj amas ŝin. Antaŭ tri tagoj malbono okazis: sur strato aŭto faligis ŝin.

Maja malsaniĝis kaj havas altan temperaturon.

Ŝia patrino diris, ke ŝi devas resti hejme.

Morgaŭ ŝi vokos doktoron.

La doktoro venis je la naŭa horo por helpi al Maja.

- Diru "A" ... montru viajn manojn ... montru viajn piedojn... malvestu vin!

La doktoro ĉion bone rigardis kaj fine diris:

- Unu semajnon restu hejme kaj ... ne iru sub aŭton. Trinku multan teon matene kaj vespere.

Mi deziras, ke vi estu trankvila. Post unu semajno vi fartos pli bone. Mi venos por revidi vin.

- Sinjoro doktoro, ĉu mia bonega amiko Karlo povas veni vidi min?

- Hm, jes... jes. Li povas veni... sed ankaŭ li estu trankvila.



Gramatikekzerco, por leciono 6

Via tasko estas enmeti vortojn aŭ vorterojn en la malplenajn lokojn. Vi devas elekti inter tiuj kiuj sekvas post "Vort(er)oj":

Vorteroj: **iĝ, kiu, e, u, et, i**

- 1) La gepatroj ĉiam deziras, ke mi lern[] mult[] .
- 2) Mia amiko deziras, ke mi ir[] kant[] kun li.
- 3) La patro volas, ke lia infano manĝ[] kukon, [] estas sur la tablo.
- 4) Ni loĝas en malgranda ĉambr[] o.
- 5) Mi far[] is maltrankvila, kiam mi vidis vin.
- 6) Ĉiuj rimarkis, ke ŝi estas bel[] a.

Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj Esperanto	en	Tradukoj / Klarigoj
		8 [] prizorgi [] to look after
1. leterportisto	[] to look after	11 [] altkvalita [] high quality
2. hejmlando	[] high quality	19 [] aligi [] to join
3. altlernejo	[] to join	3 [] grandsinjoro [] gentleman
4. grandsinjoro	[] gentleman	5 [] entute [] altogether, on the
5. iomete	[] altogether, on the whole	7 [] vespermango
	[] evening meal, sup	

6. entute evening meal, supper 22 nomigi
 to be called, to be
7. bonege to be called, to be named 15 logejo
 accomodation, dv
8. vespermanĝo accomodation, dwelling, residence 14
 depreni to deduct, take av
9. prizorgi to deduct, take away 17 dufoje
 twice
10. espereble twice 20 komencigi to begin, start
11. tutcerte to begin, start 10 tutcerte with absolute cert
12. altkvalita with absolute certainty 13 pripensi
 to think about, cor
13. matenmanĝo to think about, consider 4 iomete
 a little
14. pripensi a little 21 sidigi to sit down
15. depreni to sit down 12 matenmango breakfast
16. logejo breakfast 1 hejmlando homeland
17. treege homeland 18 multfoje many times
18. dufoje many times 0 leterportisto postman
19. multfoje postman 16 treege extremely, enorm
20. aliĝi extremely, enormously 9 espereble
 hopefully
21. komenciĝi hopefully 2 altlernejo institute of higher
22. sidiĝi institute of higher education 6 bonege
 fine, very well
23. nomiĝi fine, very well

Leciono 7 - Ĉiam malfrue

Novaj vortoj

akvo	akvo	atendi	atendi
baldaŭ	baldaŭ	diablo	diablo
dimanĉo	dimanĉo	dormi	dormi
eĉ	eĉ	fermita	fermita
for	for	frue	frue
ĝis	ĝis	homo	homo
knabo	knabo	krii	krii
kuri	kuri	lasi	lasi
laŭ	laŭ	mem	mem
memori	memori	momento	momento
nek	nek	nek ... nek	nek ... nek
nokto	nokto	poŝto	poŝto
ridi	ridi	saĝa	saĝa
salti	salti	subite	subite
suno	suno	atendi	atendi

Gramatikaj klarigoj, por leciono 7

1- Pri "nek ... nek"

"Nek ... nek" (= nek ... nek) estas uzata por nei plurajn aferojn: "nek x nek y" = "ne x kaj ankaŭ ne y".

2- Pri "mem"

"Mem" (=mem) estas uzata por emfazi ke temas ne pri iu alia, sed ĝuste pri tiu homo / besto / afero. Ekzemple: "Li mem ne scias." (= Li mem ne scias.)

3- Pri "esti" kun adjektivoj, adverboj kaj substantivoj

Ekzemploj: "Estas dimanĉo." (= Estas dimanĉo.), "Estas varme." (= Estas varme) kaj "Tio estas bona." (= Tio estas bona.)

4- ek- (subite) komenci **vidi** - vidi **ekvidi** - ekvidi

EK = "komenco de ago, subita ago". EK estas uzata nur ĉe agaj vortoj, kaj ĉiam montras manieron de la ago.

Plej ofte EK montras, ke ago komenciĝas. Ĝi montras la plej unuan momenton de la ago, ofte kun nuanco de subiteco aŭ neatenditeco:

- *kuri* → *ekkuri* = komenci kuri
- *sidi* → *eksidi* = komenci sidi
- *pluvi* → *ekpluvi* = komenci pluvi
- *floro* → *flori* → *ekflori* = komenci flori
- *de* → *ekde* = komence de (ĉi tie EK escepte aperas antaŭ ne-aga vorto)

Ankaŭ la sufikso **IĜ** povas en iuj okazoj montri komencon de ago: *sidiĝi*, *estiĝi* k.s. EK montras pli subitan, pli rapidan komencon ol IĜ.

lafoje EK montras subitan agon, kiu daŭras nur momenteton. Tiam temas ne nur pri la komenco, sed pri la tuta ago:

- *fulmi* → *ekfulmi* = momente kaj subite fulmi
- *brili* → *ekbrili* = subite kaj momente ĵeti brilon
- *rigardo* → *ekrigardo* = rapida subita rigardo

5-aĵ- io konkreta **alta** - alta **altaĵo** - altaĵo

AĴ = "(konkreta) afero".

- *bela* → *belaĵo* = (konkreta) afero aparte bela, konkretiĝo de belo
- *utila* → *utilaĵo* = (konkreta) afero, kiu estas utila
- *dolĉa* → *dolĉaĵo* = io karakterizata de dolĉa gusto (bombono k.s.)
- *nova* → *novaĵo* = afero ĵus aperinta, io ĵus okazinta
- *fari* → *faraĵo* = io farita
- *desegni* → *desegnaĵo* = desegnita bildo
- *kreski* → *kreskaĵo* = io, kio kreskas, planto
- *kovri* → *kovraĵo* = io, per kio oni kovras
- *amuzi* → *amuziĵo* = io, per kio oni povas sin amuzi
- *havi* → *havaĵo* = io havata
- *trinki* → *trinkaĵo* = io, kion oni trinkas
- *konstruo* = la ago konstrui, konstrumaniere, io konstruita → *konstruaĵo* = io konstruita (ordinare domo)
- *ligno* → *lignaĵo* = io farita el ligno
- *araneo* → *aranaĵo* = reto de araneo
- *azeno* → *azenaĵo* = azeneca (= stulta) afero

- *ĉirkaŭ* → *ĉirkaŭaĵo* = spaco, regiono, ĉirkaŭ io
- *post* → *postaĵo* = pugo, sidvangoj
- *sen senco* → *sensencaĵo* = afero, al kiu mankas senco
- *kokido* → *kokidaĵo* = manĝaĵo el kokido
- *ovo* → *ovaĵo* = manĝaĵo el ovo
- *glacio* → *glaciaĵo* = dolĉaĵo el glacieca kremo

Oni povas iafoje aldoni [participan sufikson](#) por plia precizeco: *draŝataĵo* (greno, kiun oni draŝas), *draŝitaĵo* (greno, kiun oni jam draŝis), *draŝotaĵo* (greno, kiun oni intencas draŝi), *brulantaĵo* (io, kio estas brulanta), *brulintaĵo* (io, kio jam brulis). Normale tamen simpla AĴ-vorto plene sufiĉas.

Leciono 7 - Ĉiam malfrue

Marko dormis matene tre longe. Kiam li vidis la sunon, subite li eksaltis. Ĉiam li malfruas, kiam li devas iri al lernejo. Li scias, ke la instruistino malŝatas tion. Sed hodiaŭ li ne volas malfrui. Li rapide metis la vestaĵon. Rapidege li trinkis la kafon. Poste kun la libroj en la mano li kuris kaj saltis laŭ la strato. La homoj rigardis lin kaj diris: "Kia malsaĝa knabo!" Baldaŭ li estis antaŭ la lernejo. Li volis eniri en la lernejon, sed li ne povis. Ĝi estis fermita. Li vidis nek instruiston nek gelernantojn. Li eksidis antaŭ la lernejo kaj pensis: kio okazis? - Diable, nun mi memoras! Hodiaŭ estas dimanĉo!



Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj en Esperanto

1. ridegi

overnight

2. tranokto

to eat up

3. foriri

useless

Tradukoj / Klarigoj

4. forlasi	<input type="checkbox"/>	to find out, learn	9	laueble	if possible, as mu
5. ekde	<input type="checkbox"/>	if possible, as much as possible	0	ridegi	
	<input type="checkbox"/>	to laugh loudly			
6. formanĝi	<input type="checkbox"/>	to laugh loudly	2	foriri	to leave, depart
7. forpreni	<input type="checkbox"/>	to leave, depart	17	ĝisnuna	present, current
8. knabineto	<input type="checkbox"/>	present, current	4	ekde	since, from
9. laŭdire	<input type="checkbox"/>	since, from	12	poŝtkarto	postcard
10. laŭeble	<input type="checkbox"/>	postcard	3	forlasi	to desert, forsake
11. saĝulo	<input type="checkbox"/>	to desert, forsake, quit, abandon	10	sagulo	
	<input type="checkbox"/>	wise person			
12. ekscii	<input type="checkbox"/>	wise person	8	laudre	allegedly, as is be
13. poŝtkarto	<input type="checkbox"/>	allegedly, as is being said	7	knabineto	
	<input type="checkbox"/>	little girl			
14. diableto	<input type="checkbox"/>	little girl	6	forpreni	to take away
15. senutila	<input type="checkbox"/>	to take away	15	elkuri	to run out
16. elkuri	<input type="checkbox"/>	to run out	16	ekami	to fall in love
17. ekami	<input type="checkbox"/>	to fall in love	13	diableto	little devil
18. ĝisnuna	<input type="checkbox"/>	little devil			

Leciono 8 - Malbela tago

Novaj vortoj

agi	agi	aperi	aperi
besto	besto	da	da
decidi	decidi	doloro	doloro
glaso	glaso	kelkaj	kelkaj
kontraŭ	kontraŭ	kvankam	kvankam
ludi	ludi	morti	morti
noto	noto	ofte	ofte

ordo	ordo	plori	plori
polico	polico	pro	pro
pro tio	pro tio	problemo	problemo
pura	pura	raporti	raporti
senti	senti	sovaĝa	sovaĝa
super	super	tamen	tamen
teni	teni	timi	timi
trans	trans	vino	vino
vorto	vorto		

Gramatikaj klarigoj, por leciono 8

1- Prepozicio "Da"

Da estas uzata inter kvantovorto, mezurvorto kaj la afero kies mezuron oni esprimas.

kilogramo da rizo - kilogramo da rizo

du litroj da lakto - du litroj da lakto

glaso da biero - glasoj da biero

La prepozicio *da* ligas kvantan esprimon al substantiva frazparto, kiu montras ion "substancecan" (ion nelimigitan kaj nedifinitan):

kvanto "substanco"

unu kilogramo da pano

litro da lakto

skatolo da rizo

amason da komencantoj

du milionoj da rubloj

iom da valizoj

tiom da feliĉo

multe da problemoj

La kvanta esprimo montras, kiom estas. Ĝi estas substantiva frazparto, kvanta adverbo aŭ kvanta adverbeca vorteto.

La "substanceca" esprimo montras, el kio konsistas la kvanto

- *En la botelo estas litro da lakto.*
- *Ŝi aĉetis faskon da ligno.*
- *Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo.*
- *Mi neniam prenas kun mi multon da pakajo.*
- *En la urbo troviĝas multe da aŭtoj.*
- *La riĉulo havas multe da mono.*
- *Li havas pli da mono, ol li povas kalkuli.*

2- Sufikso -ig-

ig- kaŭzi ke io/iu -as **labori** - labori **laborigi** - laborigi

IG = "efika, kaŭza aŭ ŝanĝa ago". Tio, kio staras antaŭ IG, ĉiam montras la rezulton de la ago.

- *akra → akrigi = agi tiel, ke io fariĝas akra*
 - *Mi **akrigas** mian tranĉilon.*
- *longa → longigi = agi tiel, ke io fariĝas longa*
 - *La kunveno devus esti mallonga, sed la multaj demandoj **longigos** ĝin.*
- *pli longa → plilongigi = agi tiel, ke io fariĝas pli longa*
 - *Ni devis **plilongigi** nian viziton en Hindujo.*

Oni povas fari IG-verbon el aga radiko (kiu normale estas verbo). Tia IG-verbo signifas, ke oni kaŭzas, ke iu faras la koncernan agon. La objekto de tia IG-verbo estas tio, kio estus subjekto de la simpla verbo.

Oni povas deiri de netransitiva verbo:

- *sidi → sidigi = agi tiel, ke iu komencas sidi*
 - *Li **sidigis** sian infanon sur seĝon.*

Oni ankaŭ povas deiri de transitiva verbo. La objekto de tia IG-verbo estas aŭ la subjekto de la simpla verbo, aŭ la objekto de la simpla verbo:

- *kompreni → komprenigi = agi tiel, ke iu komprenas*
 - *Mi finfine sukcesis **komprenigi** lin, ke li devas iri hejmen.*
 - *Mi ne povis **komprenigi** la ŝercon al li.*

Oni ankaŭ povas fari IG-verbon el radiko, kiu normale estas substantivo.

Tia IG-verbo povas signifi, ke oni agas tiel, ke la objekto fariĝas tio, kion la radiko montras, sed ĝi ankaŭ povas signifi, ke oni faras la objekton tia kiel la radiko, aŭ ĝi povas signifi, ke oni kaŭzas, ke la objekto faras ian agon, kiu rilatas al la radiko:

- *edzo → edzigi = agi tiel, ke iu fariĝas edzo*

▪ *Li **edzigis** sian filon al riĉa fraŭlino.*

▪ *pinto → pinta → pintigi = agi tiel, ke io fariĝas pinta, ke io ekhavas pinton*

▪ *Se vi volas skribi, vi devas unue **pintigi** vian krajonon.*

▪ *flamo → flami → flamigi = agi tiel, ke io flamas*

▪ *Petro **flamigis** la fajron per forta blovado.*

Oni ankaŭ povas fari IG-verbon el frazeto kun prepozicio:

▪ *en (la) domo → endomigi = movi en (la) domon*

▪ *Kiam komencis pluvi, ŝi rapide **endomigis** la infanojn.*

▪ *sen vesto → senvestigi = forpreni la veston de iu*

▪ *Janjo estis **senvestigita** kaj endormigita.*

La malon de *sen...igi* oni povas teorie esprimi per *kun...igi*, sed tiajn vortojn oni normale ne uzas, ĉar multaj simplaj verboj havas per si mem tian signifon: *maski* = "kunmaskigi", *vesti* = "kunvestigi". En tiaj okazoj oni povas kiel alternativon al *sen...igi* uzi la prefikson **MAL** sen IG: *malvesti* = *senvestigi*, *malmaski* = *senmaskigi*. *Senfortigi* estas pli-malpli samsignifa kiel *malfortigi*. La malo de *senfortigi* estas teorie "kunfortigi", sed tio estas senbezone peza vorto. Anstataŭe oni diras simple *fortigi*. Oni ankaŭ povas fari IG-verbon el vorteto aŭ el afikso:

▪ *for → forigi = formovi, forpreni, forviŝi, forskrapi*

▪ *Per forta lesivo ŝi sukcesis **forigi** la nigrajn makulojn.*

▪ *al → aligi = aldoni, almeti*

▪ *Ili baldaŭ discipline **aligos** siajn fortojn al tiu komuna granda armeo.*

Kiam la radiko estas nek eca, nek aga, oni povas ofte heziti, ĉu uzi simplan sensufiksitan verbon, aŭ verbon kun la sufikso IG. Ofte la lingva tradicio donis al simpla verbo IG-ecan signifon: *konfuzo* = malordego → *konfuzi* = krei malordegon, fari malordega. Ifoje la tradicio elektis uzi nur formon kun IG: *grupo* → *grupigi* = kunigi en grupo(j)n, starigi en grupo(j)n. Ifoje la tradicio donis malsaman signifon al la simpla formo kaj la IG-formo, sed ambaŭ signifoj estas IG-ecaj: *koloro* → *kolori* = doni al io sian koloron, esti tio kio donas koloron al io; *koloro* → *kolorigi* = agi tiel, ke io fariĝas kolora. Oni tamen ne povas postuli, ke ĉiuj ĉiam sekvu tiujn ĉi delikatajn distingojn. Oni devas almenaŭ toleri, se iu ifoje intermiksas ekz. *kolori* kaj *kolorigi*. Ifoje la simpla formo havas signifon, kiu ne estas IG-eca: *lumo* → *lumi* = elĵeti lumradiojn; *lumo* → *lumigi* = fari tiel ke io lumu, fari luma. Ifoje ambaŭ formoj havas la saman signifon: *ordo* → *ordi* aŭ *ordigi* = krei ordon, meti en ordon, fari orda. Nuntempe oni ĝenerale preferas la formon *ordigi*.

Ofte oni aldonas superfluan IG al verbo, kiu normale ne havu ĝin. Tio povas esti tolerata, precipe se el tio rezultas plia klareco, sed normale oni uzu la tradiciajn formojn. Ne ĉiam la formoj estas tamen tute stabilaj. En iuj okazoj la IG-sufikso eble ne estas nepra, ĉar la simpla formo apenaŭ havas ian alian signifon. Tiam oni eble estonte ekuzos la pli mallongan formon sen IG. Ofte ambaŭ formoj povas esti uzataj paralele sen signifodiferenco: *loki/lokigi*, *arkivi/arkivigi*, *listi/listigi*.

IG kutime aperas kun verba finaĵo, sed povas ankaŭ havi O-finaĵon, A-finaĵon aŭ E-finaĵon. Tiaj formoj montras la saman agan signifon kiel la verba formo: *akrigo* = "la ago akrigi", *akriga* = "rilata al la ago akrigi, akriganta", *sidigo* = "la ago sidigi", *sidige* = "rilate al la ago sidigi, sidigante", *edzigo* = "la ago edzigi", *edziga* = "rilata al la ago edzigi".

3- Sufikso -aĉ-

-aĉ- malbona (principe pri kvalito) **domo** - domo **domaĉo** - domaĉo

AĈ = "malbona kvalito, sentaŭgeco, senvaloreco".

- *domo* → *domaĉo* = malbona, kaduka, disfalanta domo
- *ĉevalo* → *ĉevalaĉo* = malbona, senvalora ĉevalo
- *babili* → *babilaĉi* = stulte, malice babili

Leciono 8 - Malbela tago

Hodiaŭ mia patrino estis tre maltrankvila. Mi venis el la lernejo kaj raportis al ŝi, ke mi ricevis malbonan noton. Ŝi diris: Knabaĉo, vi devas pli multe laborigi vian kapon. Kiom da malbonaj notoj vi havas?

Mi estis malĝoja.

- Iru en vian ĉambron kaj lernu! - Ŝi diris.

Mi sidis en mia ĉambro, sed mi povis nek lerni nek legi. Miaj pensoj estis ĉe ludo kun miaj amikoj kaj ĉe sporto.

Mi diris al mi mem: ĉu mi estas tiom malsaĝa, kvankam mi lernis multe?

Tiam la patrino eniris la ĉambron kaj aŭdis miajn vortojn. Ŝi tuj respondis:

- Ne, mia kara, vi ne estas malsaĝa. La problemo estas, ke vi devas lerni multe pli.

Tiam vi ne havos nur malbonajn notojn.

- Ankaŭ nun mi ne havas ilin. Mi havas bonan noton pri muziko - mi diris.

- La patrino subite ekridis. Tio denove plibeligis mian tagon. Sed la problemo tamen restis.



Gramatikekzerco, por leciono 8

Via tasko estas enmeti vortojn aŭ vorterojn en la malplenajn lokojn. Vi devas elekti inter tiuj kiuj sekvas post "Vort(er)oj:"

Vorteroj: ig, iĝ, aĉ, da	
1)	Ni ord[]is ĉion kaj transdonis al ili.
2)	Mi petas glason []kafo kaj iom []akvo.
3)	Doloris lin la kapo. Li malsan[]is.
4)	La knabino ŝatas esti bela kaj pro tio ŝi bel[]as sian vizaĝon.
5)	Tiu knab[]o agis malbone kaj plor[]is la knabinon.
6)	Hieraŭ aperis kelkaj sovaĝaj bestoj. Homoj mort[]is ilin.

Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj en Esperanto	Tradukoj / Klarigoj
	[] 20 sciigi informieren, kundt
1. subteni	[] informieren, kundtun, ankündigen [] 19 malesperigi [] verzeifeln lasse
2. malaperigi	[] verzeifeln lassen [] 23 superrigardo Übersicht
3. elteni	[] Übersicht [] 14 aperigi erscheinen lasse
4. utiligi	[] erscheinen lassen [] 9 memorigi in Erinnerung brin

5. deteni sin in Erinnerung bringen
6. alivorte in anderen Worten
7. kunordigi brauchbar
8. sinteno brauchbar
 überreichen, aushändigen, überliefern
9. loĝigi forigi
10. memorigi beseitigen, abschaffen, entfernen, fortschaffen
11. plifortigi nutzbar machen, brauchen
12. renovigo unterbringen
 entleeren, ausleeren
13. starigi unsterblich
 Haltung, Meinung, Verhalten
14. utiligebla aufstellen
15. aperigi aufstellen
 ertragen, ausstehen, aushalten
16. forigi manchmal
17. devigi manchmal
 unterstützen, unterhalten, stemmen
18. senmorta Erneuerung
19. malplenigi verstärken
 verschwinden lassen
20. malesperigi zwingen
21. sciigi koordinieren
22. kelkfoje koordinieren
23. transdoni koordinieren
24. superrigardo koordinieren

Leciono 9 - Plano pri veturado

Novaj vortoj

almenaŭ	almenaŭ	atenti	atenti
ĉirkaŭ	ĉirkaŭ	diversaj	diversaj
do	do	ekster	ekster
feliĉa	feliĉa	ideo	ideo
klara	klara	kredi	kredi
kvazaŭ	kvazaŭ	libera	libera
maniero	maniero	manki	manki
mondo	mondo	onklo	onklo
organizo	organizo	plano	plano
pluvo	pluvo	rajti	rajti
rakonti	rakonti	sama	sama
sekreto	sekreto	ŝajni	ŝajni
urbo	urbo	uzi	uzi
vagono	vagono	vojaĝi	vojaĝi
vojo	vojo		

Gramatikaj klarigoj, por leciono 9

1- Uzo de verboformo -us

-us	kondiĉformo (kondicionalo)	estus - estus skribus - skribus
------------	-------------------------------	--

Kondicionalo: US-finaĵo

Kondicionala verbo, verbo kun US-finaĵo, estas uzata por agoj kaj statoj nerealaj, imagaj aŭ fantaziaj. US-formo ne montras la tempon de la ago:

- *laborus* = la ago "labori" estas imagata
- *estus* = la stato "esti" estas imagata

- *Se mi **estus** riĉa, mi ne **laborus**.* Temas pri nerealaj, imagaj stato kaj ago.
- *Se mi **estus** sana, mi **estus** feliĉa.*
- *Se mi nur **loĝus** en palaco!* La loĝado estas dezirata, sed mi scias, ke ĝi ne estas ebla, ke ĝi estas nura fantazio.
- *Mi ne **farus** la eraron, se li antaŭe **dirus** al mi la veron (aŭ se li **estus** dirinta al mi la veron).* Kaj *farus*, kaj *dirus* ĉi tie rakontas pri imagataj agoj en la pasinteco. Se oni volas, oni povas montri la pasintecon per [estus dirinta](#).

Oni ankaŭ uzas kondicionalon por pli milde prezenti petojn aŭ dezirojn:

- *Mi **dezirus** aĉeti kelkajn aferojn.* Reala deziro, sed ĝentile prezentata.
- *Ĉu mi **povus** havi la skribilon?* Tre ĝentila, milda peto.
- *Ĉu vi **bonvolus** paroli iom pli silente.* Tre ĝentila, milda peto.

Kondicionalo estas ofte uzata kun la vorteto [se](#), kiu montras kondiĉon, sed se ne aŭtomate necesigas kondicionalon. Ĉio dependas de la senco. Se temas klare pri imagoj, oni uzu US, sed se eble estas reala ago aŭ stato, oni uzu indikativon:

- *Se li **estus** ĉi tie, li certe **mirus** pri la malordo.* Oni scias, ke li ne estas ĉi tie, sed se li estus, li ankaŭ mirus.
- *Se li **estas** ĉi tie, li certe **miras** pri la malordo.* Oni ne scias, ĉu li estas ĉi tie, sed tiel ja povas esti. Se tiel efektive estas, li ankaŭ efektive miras.

En kelkaj lingvoj la verbformo por kondicionalo estas uzata ankaŭ por io, kio iam estis antaŭvidita. Tion Esperanto esprimas per kunmetita verboformo: [estis ...onta](#) aŭ [estis ...ota](#).

2- Pri "kvazaŭ"

"Kvazaŭ" (=kvazaŭ) signifas 'kiel, sed ne vere kiel (io/iu)'. Ekzemple: "Mi falis kvazaŭ mi estus ebria." (= Mi falis kvazaŭ mi estus ebria.)

3- Sufikso "AD"

-ad- daŭra aŭ ripeta ago **kanti** - kanti **kantado** - kantado

AD = "daŭra ago".

- *uzo* → *uzado* = daŭra, regula uzo

- *viziti* → *vizitadi* = ofte, regule viziti
- *konstruo* = la ago konstrui, konstrumaniero, io konstruita → *konstruado* = la ago (daŭre) konstrui
- *martelo* (ilo) → *marteli* = bati per martelo → *martelado* = la ago (daŭre) marteli
- *reĝo* (persono) → *reĝi* = regi kiel reĝo → *reĝado* = la ago (daŭre) reĝi

Se oni volas montri, ke temas pri ago, sed ne deziras la daŭran signifon de AD, oni devas uzi alian agan radikon sen daŭra signifo, aŭ esprimi sin tute alie: *martelado* (daŭra) → *martelbato* = unu bato per martelo; *brosado* (daŭra) → *brostiro* = unu frota tiro per broso.

3- Sufikso "AR"

-ar- multaj kiel unu tuto **arbo** - arbo **arbaro** - arbaro

AR = "tuto aŭ kolekto de multaj samspecaj aferoj".

- *homo* → *homaro* = ĉiuj homoj en la mondo, la tuta homa gento
- *birdo* → *birdaro* = ĉiuj birdoj en la mondo aŭ en unu regiono
- *gazeto* → *gazetaro* = ĉiuj gazetoj en unu regiono
- *verko* → *verkaro* = ĉiuj verkoj de unu aŭtoro
- *estro* → *estraro* = elektita grupo de estroj de unu organizo
- *arbo* → *arbaro* = loko kun multaj kune kreskantaj arboj
- *haro* → *hararo* = ĉiuj haroj sur ies kapo
- *ŝafo* → *ŝafaro* = ĉiuj ŝafoj de unu posedanto aŭ en unu loko
- *meblo* → *meblaro* = ĉiuj mebloj de unu ĉambro/apartamento/domo
- *altaj montoj* → *altmontaro* = masivo aŭ ĉeno de altaj montoj
- *vorto* → *vortaro* = libro kun listo de vortoj kaj klarigoj pri ili
- *horo* → *horaro* = tabelo de horoj, en kiuj okazas io speciala
- *ŝtupeto* → *ŝtupetaro* = grimpilo el du stangoj kun multaj ŝtupetoj (= eskalo)
- *vagono* → *vagonaro* = vico de kunigitaj vagonoj tirata de lokomotivo (= trajno)

4- Sufikso "UM"

-um- um **komuna** - komuna **komunumo** - komunumo

La sufikso UM ne havas difinitan signifon. Per ĝi oni faras vortojn, kiuj havas ian rilaton al tio, kio staras antaŭ UM. Ĉiun UM-vorton oni devas aparte lerni. Ekzistas tamen kelkaj grupoj de UM-vortoj kun similaj signifoj.

Multaj UM-verboj signifas "agi en certa maniero per tio, kio staras antaŭ UM":

- *folio* → *foliumi* = turni la foliojn de libro aŭ gazeto por rapide kaj pase iom legi
- *palpebro* → *palpebrumi* = rapide fermi kaj malfermi la palpebrojn
- *brako* → *brakumi* = ĉirkaŭbraki

luj UM-verboj signifas "provizi en certa maniero per tio, kio staras antaŭ UM":

- *aero* → *aerumi* = elmeti al aero, enlasi aeron por freŝigi
- *sukero* → *sukerumi* = kovri per sukero

Grupo de UM-verboj montras manieron de ekzekutado, mortigado:

- *kruco* → *krucumi* = najli aŭ ligi al kruco por mortigi
- *pendi* → *pendumi* = pendigi per ŝnuro ĉirkaŭ la kolo por mortigi

luj UM-vortoj estas nomo de vestaĵparto aŭ simila afero. Tio, kio staras antaŭ UM montras korpoparton, ĉe kiu la afero troviĝas:

- *kolo* → *kolumo* = vestaĵparto, kiu ĉirkaŭas la kolon
- *nazo* → *nazumo* = speco de okulvitroj, kiuj fiksiĝas pinĉe sur la nazo

UM estas uzata en matematiko por fari nomojn de nombrosistemoj. Oni metas UM post nombro, kiu montras, kiom da ciferoj uzas la sistemo:

- *du* → *duuma nombrosistemo* = sistemo kun du ciferoj, binara sistemo
- *dek* → *dekuma nombrosistemo* = sistemo kun dek ciferoj, decimala sistemo

Kelkaj aliaj UM-vortoj:

- *malvarma* → *malvarmumi* = malsaniĝi je tuso, nazkataro k.t.p. (supoze pro malvarmo)
- *plena* → *plenumi* = fari plene (taskon, devon k.s.)

- *gusti* → *gustumi* = senti guston, provi guston
- *loto* → *lotumi* = disdoni laŭ decido per lotado
- *komuna* → *komunumo* = administra distrikto ĉirkaŭ urbo, societo aŭ organizo kunlabora, kunloĝa k.t.p.
- *dekstra* → *dekstruma* = tia, ke ĝi turniĝas aŭ volviĝas dekstren (horloĝdirekten)
- *proksima* → *proksimume* = ne ekzakte, ĉirkaŭ

Se oni volas krei novan UM-vorton, oni estu tre singarda, ĉar aliaj ĝin eble ne komprenos. UM-vorto, kiu aliĝas al iu el la ĉi-antaŭaj grupoj, pli facile akceptiĝas, dum UM-vorto, kiu ne similas al jam ekzistanta UM-vorto, estas pli malfacile enkondukebla. Ofte oni tamen faras okazan UM-vorton, kiu kompreniĝas pro la kunteksto, kaj kiu poste malaperas.

Leciono 9 - Plano pri veturado

Petro kaj Maria volis vojaĝi al alia lando en libertempo. Ili decidis iri al Italio, bela lando kun malnovaj urboj kaj aliaj belaĵoj. Ili estis feliĉaj:

- Kie estas mia vestaĵo? - ŝi demandis.

- Ni ne forgesu kunporti la libron por lerni Esperanton. Ni povus komenci jam en la vagonaro.

- En la vagonaro ni nenion faros, kara Petro. Ni veturos per aŭto. Mi havas sekreton: mia riĉa onklo Bonifacio plenumis mian deziron kaj donis al ni sian aŭton por uzo. Ĝi jam staras antaŭ la domo.

- Sed mi devas diri...

- Nenion diru, karulo, ni eksidu en la aŭton kaj veturu al Italio.

Petro kaj Maria sidis en la aŭto. Ankaŭ la vestaĵoj estis en la aŭto. Sed ili ankoraŭ sidadis kaj atendis.

- Do, karulo - ŝi diris - kial ni ne ekveturas?

- Karulino, ankaŭ mi havas sekreton. Mi veturigis la aŭton, sed mi ne scias. Mi neniam lernis tion.

Gramatikekzerco, por leciono 9

Via tasko estas enmeti vortojn aŭ vorterojn en la malplenajn lokojn. Vi devas elekti inter tiuj kiuj sekvas post "Vort(er)oj"

Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj en Esperanto

Vortoj en Esperanto	Tradukoj / Klarigoj
	11 cirkauajo abords, muraille, e
1. nekredebla	<input type="checkbox"/> abords, muraille, enceinte 2 informado
	information
2. organizado	<input type="checkbox"/> information 0 nekredebla invraisemblable
3. informado	<input type="checkbox"/> invraisemblable 3 libervole volontairement
4. libervole	<input type="checkbox"/> volontairement 9 restado séjour
5. parolado	<input type="checkbox"/> séjour 12 domaco mesure
6. homaro	<input type="checkbox"/> mesure 8 novajo nouvelle, nouvea
7. kunvojaĝi	<input type="checkbox"/> nouvelle, nouveauté 6 kunvojagi voyager ensembl
8. manĝaĵo	<input type="checkbox"/> voyager ensemble 13 tiuokaze alors
9. novajo	<input type="checkbox"/> alors 4 parolado discours
10. restado	<input type="checkbox"/> discours 7 mangajo nourriture, aliment
11. vagonaro	<input type="checkbox"/> nourriture, aliment 1 organizado organisation

12. ĉirkaŭaĵo organisation 5 homaro humanité (ensembl
13. domaĉo humanité (ensemble des hommes) 10
14. tiuokaze rame (train), train

Leciono 10 - Familianoj kunvenas

Novaj vortoj

aĝo	aĝo	anstataŭ	anstataŭ
ĉefo	ĉefo	daŭri	daŭri
dika	dika	dolĉa	dolĉa
ekskurso	ekskurso	ekzemplo	ekzemplo
ĝusta	ĝusta	interesa	interesa
ĵeti	ĵeti	lakto	lakto
minuto	minuto	naski	naski
opinii	opinii	parto	parto
pasi	pasi	proponi	proponi
reala	reala	rilato	rilato
sekvi	sekvi	silento	silento
simpla	simpla	sukcesi	sukcesi
ŝanĝi	ŝanĝi	telefono	telefono
tro	tro	trovi	trovi
universala	universala	viziti	viziti

Gramatikaj klarigoj, por leciono 10

1- **Sufikso "an"**- membro, apartenanto **Kristo** - Kristo **kristano** - kristano

AN = "membro de grupo, loĝanto de loko, adepto de doktrino, persono kiu apartenas al loko" k.s.

- *klubo* → *klubano* = membro de klubo
- *Eŭropo* → *Eŭropano* = loĝanto de Eŭropo
- *vilaĝo* → *vilaĝano* = loĝanto de vilaĝo
- *Islamo* → *Islamano* = kredanto je Islamo
- *respubliko* → *respublikano* = subtenanto de la ideo ke ŝtato estu respubliko, ano de partio kiu nomas sin respublika
- *ŝipo* → *ŝipano* = homo, kiu servas sur ŝipo
- *estraro* → *estrarano* = membro de estraro
- *sama lando* → *samlandano* = loĝanto de la sama lando

2- **Sufikso** kvalito kiel abstrakta

"ec"-

ideo

rapida - rapida **rapideco** - rapideco

EC = "kvalito aŭ stato (de iu aŭ io)". EC ĉiam montras ion abstraktan (kvaliton aŭ staton).

- *bono* = la abstrakta ideo bono → *boneco* = bono kiel ies kvalito

- *Vi estos kiel Dio, vi scios **bonon** kaj malbonon.*
- *Ili admiris la **bonecon** de lia ago.*

- *ruĝo* = la koloro ruĝo → *ruĝeco* = la stato esti ruĝa

- *Ŝiaj blankaj vangoj estis kolorigitaj de freŝa **ruĝo**.*
- *La **ruĝeco** de ŝiaj vangoj malkaŝis ŝiajn sentojn.*

- *longo* = horizontala dimensio (ĉiu konkretaĵo havas ian longon) → *longeco* = la eco esti longa, havi multe da longo

- *Ni mezuris la **longon** de ĝiaj kruroj, kaj trovis, ke ili estas tre mallongaj.*
- *La **longeco** de ĝiaj kruroj tre surprizis nin. La kruroj estis surprize longaj.*

- *rapido* = mezuro de distanco irata en certa tempo (ĉiu moviĝanta afero havas ian rapidon) → *rapideco* = eco de io, kio iras (tre) rapide

- *La **rapido** de la aŭto estis nur 20 kilometroj en horo.*

▪ *La aviadilo pasis kun fulma **rapideco**.*

- *homo* → *homeco* = natura kvalito de homo
- *granda animo* → *grandanimeco* = la eco havi grandan (= noblan) animon
- *korekto* → *korekteco* = la eco esti korekta, senerara
- *unu* → *unueco* = la eco esti kiel unu
- *unua* → *unuaeco* = la eco esti la unua
- *estonta* → *estonteco* = estonta tempo. Formoj kiel *estonto* normale montras personon, kiel ĉiuj [participoj kun O-finaĵo](#), sed iafoje oni uzas *estonto* kiel mallongigon de *estonteco*.
- *pasinta* → *pasinteco* = pasinta tempo
- *infano* → *infaneco* = eco esti infana, infanaĝo

lafoje EC estas uzata mallogike pro influo de naciaj lingvoj: **Bedaŭrinde mi ne havas la **eblecon** tion ĉi fari.** Fakte tute ne temas pri eco, sed pri *eblo* (aŭ eventuale *eblaĵo*). Diru kiel Zamenhof: *Bedaŭrinde mi ne havas la **eblon** tion ĉi fari.* (Se oni hezitas inter *eblo* kaj *ebleco*, oni elektu *eblo*, ĉar ĝi estas resuma formo kaj por *ebleco*, kaj por *eblaĵo*, kaj tial *eblo* apenaŭ iam povas esti malĝusta elekto.)

EC ankaŭ povas esti uzata kun A-finaĵo aŭ E-finaĵo (aŭ verba finaĵo). Tiaj formoj havas normale la signifon "simila, simile, samaspekta kiel, samamaniere kiel":

- ***ligneca** papero* = papero parte aspektanta kiel ligno
- *Ni havas **amikecajn** rilatojn kun ili.* = *Ni rilatas kvazaŭ ni estus amikoj.*

lafoje oni povas por klareco uzi anstataŭe kunmetaĵojn kun *ŝajna*, *simila*, *maniera* aŭ *stila*. lafoje formoj kun ...*eca* signifas "rilata al tia eco, pri la koncerna eco": ***patreca** testo* = testo pri patreco, testo por eltrovi, ĉu iu estas patro.

3- Sufikso uj- ujo **mono** - mono **monujo** - monujo

UJ = "io, kio estas destinita enhavi ion certan". UJ havas praktike tri malsamajn signifojn: "entenilo", "kreskaĵo" kaj "lando". Tio, kio staras antaŭ UJ, ĉiam montras tion, kio estas (aŭ okazas) en la afero.

UJ povas montri specialan entenilon, vazon, skatolon k.t.p., kiu servas por enhavi ion, aŭ en kiu oni faras ian agon:

- *salo* → *salujo* = vazeto, en kiu oni tenas salon por uzo ĉe manĝotablo
- *cigaro* → *cigarujo* = skatoleto por cigaroj
- *abelo* → *abelujo* = artefarita loĝejo por abeloj (natura loĝejo de abeloj povas esti *abelejo*, sed tiu vorto signifas ankaŭ "loko, kie abelbredisto tenas abelujojn")
- *mono* → *monujo* = saketo (aŭ alispeca entenileto) por porti monon
- *bani* → *banujo* = kuvo aŭ simile, en kiu oni banas sin mem aŭ iun alian
- *trinki* → *trinkujo* = granda longforma ujo (trogo), el kiu bestoj trinkas

Por precizeco oni povas fari kunmetaĵojn kun aliaj radikoj, ekz.: *teskatolo*, *tekruĉo*, *tetaso*, *cigarskatolo*, *cigaredpaketo*, *konservskatolo*.

Rimarku, ke tio, kio staras antaŭ UJ, ĉiam devige montras enhavon, dum tio, kio staras antaŭ SKATOL, VAZ k.t.p., povas montri jen enhavon, jen materialon, jen ion alian, ekz.: *ladskatolo* = "skatolo el lado", *lignositelo* = "sitelo el ligno". Sed *ladujo* devas esti "ujo por lado", kaj *lignujo* estas nepre "ujo por ligno".

Ĉe nomo de frukto, bero aŭ floro UJ povas montri kreskaĵon, normale arbon aŭ arbuston, kiu donas tian frukton, beron aŭ floron:

- *pomo* → *pomujo* = pomarbo
- *vinbero* → *vinberujo* = vin(ber)arbusto
- *rozo* → *rozujo* = rozplanto

Oni povas diri ankaŭ *pomarbo*, *vinberarbusto* k.t.p.

Ĉe nomo de popolano, UJ ĉiam signifas "la lando de tiu popolo":

- *Franco* → *Francujo* = la lando de la Francoj
- *Ĉino* → *Ĉinujo* = la lando de la Ĉinoj
- *Somalo* → *Somalujo* = la lando de la Somaloj

lafoje oni faras landan aŭ regionan UJ-vorton el alispeca vorto:

- *patro* → *patrujo* = patrolando, hejmlando, origina lando
- *Esperanto* → *Esperantujo* = Esperantolando, la (imagata) lando de la Esperantistoj, la Esperanta mondo (la kongresoj k.t.p.)

En landonomoj oni uzas kiel alternativojn al UJ, ankaŭ la radikon LAND sufiksece, kaj la neoficialan sufikson I. Plej multaj landoj havas tamen nekunmetitan nomon, ekz. *Usono, Birmo, Liĥtenŝtejno, Islando* (ne farita per la radiko LAND!) k.a. En tiaj okazoj oni uzas la sufikson AN por fari nomon de landanoj: *Usonano, Birmano* k.t.p.

Leciono 10 - Familianoj kunvenas

Alklaku vorton kiun vi ne komprenas kaj aperos traduko/klarigo en vortarfenestro dekstre.

- Kiel rapide pasas tagoj! Morgaŭ estas la naskiĝtago de via patro, Marko. Alvenos kelkaj familianoj kaj geamikoj. Ĉu vi bonvolus iom helpi? Trovu iomete da tempo almenaŭ por ordigi vian ĉambron. Mi ŝatus kuiri ion bonan. Por la naskiĝtaga kuko mankas lakto en la hejmo. Necesas havigi iom da manĝaĵo el vendejo...

- Bone, mi aĉetumos por la naskiĝtago. Sed anstataŭ sidi kaj manĝegi kun neinteresaj familianoj, mi ŝatus ekskursi kun klubanoj.

- Kun kiuj klubanoj? - diris la patrino kaj ĵetis iajn paperojn en paperujon.

- Morgaŭ frue kunvenas anoj de mia sporta klubo.

- Sed, kara mia, ĉu ĝuste morgaŭ vi devas foresti? Ĉu vi ne intervidiĝas kun viaj samklubanoj tri foje semajne?

- Ĉu mi rajtas ion proponi? Mi kunmanĝos kun la familianoj. Sed en la dua parto de la tago mi foriros kun miaj geamikoj. Post la kuko Maria kaj Petro certe parolos pri la malsukcesa veturado per aŭto. Malinterese! Mi ne plu volas tion aŭdi! Kial ni ne havas iun ideoriĉan onklon Bonifacion en nia familio?

La patrino ridetis je liaj vortoj. Ŝi scias, ke Marko iom tro parolas hodiaŭ.

- Kara Marko, ne sufiĉas nur riĉeco de

- Kara Marko, ne sufiĉas nur riĉeco de ideoj. Necesas ankaŭ plena monujo por realigi ilin.

La patrino post iom da silento daŭrigis:

- Nu, antaŭ kelkaj minutoj telefonis Ana, ke ankaŭ ŝi vizitos nin morgaŭ. Ŝi tre ŝatas dolĉajn kukojn, kvankam ŝi atentos por ne dikiĝi.

Tuj Marko ŝanĝis la opinion. Sen Ana dum la ekskurso li estus tre soleca.

- Patrino, tiuokaze mi tamen pasigos la morgaŭan tagon hejme.

Gramatikekzerco, por leciono 10

Via tasko estas enmeti vortojn aŭ vorterojn en la malplenajn lokojn. Vi devas elekti inter tiuj kiuj sekvas post "Vort(er)oj

Vorteroj: **an, ig, uj, ec**

1) En jun[]o oni havas ankaŭ bel[]on.

2) Malsimplajn laborojn ĉefoj devus plisimpl[]i.

3) En tiu aĝo li jam fariĝis klub[]o de sporta klubo.

4) Monon oni metas en mon[]on.

5) Sekvu la ekzemplon de bona famili[]o.

Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj en Esperanto

1. verŝajne

Tradukoj / Klarigoj 8 samtempe at the same time

2. tutsimple

at the same time 17 varmece warmth

3. neŭtraleco

warmth 19 duparta two-part

4. tiurilate

two-part 1 tutsimple very simply

5. universaleco

very simply 16 translogigi to move (house)

6. ebleco

to move (house) 13 kuiristino cook, female cook

7. partopreni

cook, female cook 24 daurigi to go on, proceed

8. plejparte

to go on, proceed with, continue 15 transformigi

9. samtempe

to become transf

to become transformed 3 tiurilate

10. anstataŭigi

with relation to the

with relation to that 6 partopreni to take part, partic

11. elĵeti

to take part, participate 20 forĵeti

12. finiĝi

to throw away

to throw away 23 troviĝi to be found, find c

13. informiĝi

to be found, find oneself, be located 0

14. kuiristino

versajne probably

probably 22 pasigi to pass, spend (ti

15. solidareco

to pass, spend (time) 9 anstataŭigi

to substitute, repl

to substitute, replace 7 plejparte

16. transformiĝi

mostly

mostly 14 solidareco solidarity

17. transloĝiĝi solidarity 4 universaleco universality, gene
18. varmecco universality, generality 5 ebleco
 possibility
19. translokigi possibility 12 informigi to find out, be adv
20. duparta to find out, be advised 25 realigi
 to produce, create
21. forĵeti to produce, create 21 sinsekve consecutively
22. sinsekve consecutively 18 translokigi to move (to a new
23. pasigi to move (to a new position) 10 eljeti
 to throw out
24. troviĝi to throw out 2 neutraleco neutrality
25. daŭrigi neutrality 11 finiĝi to come to an end
26. realigi to come to an end, end, end up, expire

Leciono 11 - La sentimulo

Novaj vortoj

apud	apud	estro	estro
flanko	flanko	gondolo	gondolo
grava	grava	halti	halti
koloro	koloro	koni	koni
konsenti	konsenti	laŭta	laŭta
lumo	lumo	maro	maro
mezo	mezo	milito	milito
movi	movi	pagi	pagi
pano	pano	placo	placo

preskaŭ	preskaŭ	proksimume	proksimume
publiko	publiko	punkto	punkto
sata	sata	ŝipo	ŝipo

Gramatikaj klarigoj, por leciono 11

1- Sufikso -il- instrumento, rimedo **tranĉi** - tranĉi **tranĉilo** - tranĉilo

IL = "instrumento, aparato, rimedo".

- *segi* → *segilo* = instrumento por segi
- *fosi* → *fosilo* = instrumento por fosi
- *kudri* → *kudrilo* = pinta instrumenteto por kudri
- *tondi* → *tondilo* = instrumento por tondi (kiu konsistas el du klingoj)
- *ŝlosi* → *ŝlosilo* = instrumento, kiun oni turnas en seruro por ŝlosi aŭ malŝlosi
- *manĝi* → *manĝilo* = instrumento por manĝi (telero, kulero, tranĉilo, forko, manĝbastoneto, glaso aŭ simile)
- *sonori* → *sonorilo* = instrumento, kiu sonoras (uzanto de sonorilo ne sonoras, sed sonorigas)
- *presi* → *presilo* = maŝino por presado de libroj, gazetoj k.t.p.
- *komputi* → *komputilo* = (elektronika) aparato por prilabori informojn kaj fari tre rapidajn kalkulojn
- *aboni* → *abonilo* = papero, per kiu eblas aboni ion
- *aliĝi* → *aliĝilo* = papero, per kiu eblas aliĝi al io (ekz. kongreso)
- *kuraci* → *kuracilo* = io ajn, kio servas por kuraci (ekz. medikamento)

La sufikso IL havas tre ĝeneralan signifon. Por esprimi sin pli ekzakte oni povas fari kunmetaĵojn kun aliaj radikoj, ekz.: *presmaŝino*, *transportaparato*, *vendaŭtomato*. Sed ofte taŭgas simpla IL-formo.

En iuj malmultaj IL-vortoj la aga elemento estas subkomprenata. Tio, kio staras antaŭ IL, ne mem montras agon, sed ekz. rezulton de ago: *fajro* → *fajrilo* = ilo por fari fajron (ne "ilo por fajri")

Leciono 11 - La sentimulo

Estis vespero en Venecio. Centoj da homoj plenigadis la Sankt-Markan placon. Junuloj kaj militistoj, maristoj de sur ŝipoj, elstaraj sinjorinoj kaj junulinoj, alilandaj vojaĝantoj, ĉambristoj kaj gondolistoj - ĉiuj moviĝis al la urbomezo. Iom plue, sed ne malproksime de la maro troviĝis malgranda placo. Fine de ĝi, proksime de la maro, staris homo. Laŭ la vestaĵo oni facile povis ekscii, ke li estas gondolisto de iu riĉulo. Seninterese li rigardis la ĝojan hommulton. Subite rideto lumigis lian vizaĝon, kiam li ekvidis mariston, kiu alvenis el la flanko de la maro.

- Ĉu tio estas vi, Stefano? - ekkriis la gondolisto. - Ĉiuj diras, ke vi falis en la manojn de la Turkoj.

- Vere. Ni renkontis unu el iliaj ŝipoj. Ĝi sekvis nin dum pli ol unu horo. Sed ne estas facile iri pli rapide ol nia ŝipo. Do, kiaj novaĵoj estas tie ĉi en Venecio?

- Nenio interesa - nur granda malfeliĉo por Pietro. Ĉu vi konas Pietron?

- Kompreneble, ke mi konas.

- Granda ŝipo subakvigis lian gondolon.

- Kaj kio pri Pietro?

- Lia gondolo subakviĝis. Okazis, ke ni troviĝis proksime, tiel ke Ĝorĝo kaj mi prenis Pietron en nian gondolon. En la sama tempo mia estro subakviĝis por helpi ĝin. Ĝi preskaŭ iam mortis kun sia

junulinon, kiu preskaŭ jam mortis kun sia onklo.

- Ho, tie estis junulino - kaj onklo?

- Lin ni ne povis helpi. Estis grava homo. Sed kio vin alvenigis en Venecion, amiko mia?

La maristo rapide ekrigardis sian amikon kaj komencis diri:

- Do, vi scias Ĝino - mi alportis...

La gondolisto subite haltigis lin. "Vidu!" - li diris. Tiam iu homo pasis apud ili. Li ankoraŭ ne estis tridekjara kaj lia vizaĝo estis senkolora. Lia iro estis certa kaj facila. Lia vizaĝo estis malĝoja.

- Jakopo - diris Ĝino, kiam li ekvidis la homon - oni diras ke multaj gravuloj donas sekretajn laborojn al li. Li scias tro da sekretoj. Kaj tial ili timas sendi lin en malliberejon - diris la maristo kaj dum li parolis, li montris la domegon de la Doĝoj.

- Vere, multaj gravuloj bezonas lian helpon

- diris Ĝino.

- Kaj kiom ili pagas al li por unu mortigo?

- Certe ne malpli ol cento monerojn. Ne forgesu, ke li laboras por tiuj, kiuj havas sufiĉe da mono por pagi al li. Sed, Stefano, en Venecio estas aferoj, kiujn estas pli bone forgesi, se vi volas trankvile manĝi vian panon.

Estis iom da silento kaj poste la gondolisto denove ekparolis.

- Vi venis ĝustatempe por vidi ŝipkuron.

- Ĝino, iu diris malforte proksime de la gondolisto.

- Sinjoro?

Don Kamilo Monforte, la estro de Ĝino senvorte montris al la gondolo - Ĝis la revido - diris la gondolisto kaj prenis la manon de sia amiko.

(El la libro "La sentimulo" de J.F. Cooper.

Adaptis Roger Imbert)

Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj en Esperanto

	Tradukoj / Klarigoj	7	malfermilo	apriscatole
1. estro	<input type="checkbox"/> apriscatole	8	noktomezo	mezzanotte
2. tagmeze	<input type="checkbox"/> mezzanotte	1	tagmeze	a mezzogiorno
3. posttagmeze	<input type="checkbox"/> a mezzogiorno	0	estro	signore, padrone
4. malsata	<input type="checkbox"/> signore, padrone	9	publikigi	stampare, public
5. interkonsento	<input type="checkbox"/> stampare, pubblicare, pubblicare, stampare	5		
	<input type="checkbox"/> mangilaro		posate	
6. manĝilaro	<input type="checkbox"/> posate	4	interkonsento	patto
7. vidpunkto	<input type="checkbox"/> patto	3	malsata	affamato/a
8. malfermilo	<input type="checkbox"/> affamato/a	6	vidpunkto	punto di vista

9. noktomezo punto di vista 2 posttagmeze ptm
10. publikigi ptm 11 duflanka a due facce, bilat
11. pagigi a due facce, bilaterale 10 pagigi
 far pagare
12. duflanka far pagare 12 aliflanke dall'altro lato
13. aliflanke dall'altro lato

Leciono 12 - Nokta promeno

Novaj vortoj

agrabla	agrabla	ajn	ajn
akcepti	akcepti	ambaŭ	ambaŭ
arbo	arbo	aspekti	aspekti
aŭtoritato	aŭtoritato	bieno	bieno
branĉo	branĉo	bruo	bruo
buŝo	buŝo	direkto	direkto
efektive	efektive	fakto	fakto
formo	formo	fuŝi	fuŝi
grafo	grafo	ĝenerale	ĝenerale
ĝeni	ĝeni	industrio	industrio
inviti	inviti	ju... des	ju... des
kalva	kalva	kapabla	kapabla
kapti	kapti	kastelo	kastelo
kavo	kavo	kontenta	kontenta
kontroli	kontroli	koro	koro
korpo	korpo	krom	krom
lampo	lampo	larĝa	larĝa

miri	miri	monto	monto
natur	natur	odoro	odoro
orelo	orelo	paco	paco
paŝi	paŝi	perdi	perdi
persono	persono	peza	peza
preta	preta	prezenti	prezenti
promeni	promeni	provi	provi
rekta	rekta	renkonti	renkonti
respekti	respekti	rolo	rolo
seka	seka	simila	simila
situacio	situacio	sono	sono
supre	supre	supren	supren
teroristo	teroristo	tono	tono
tuŝi	tuŝi	viro	viro

Gramatikaj klarigoj, por leciono 12

1- Pri "ju ... des"

"Ju x, des y" (= ju x, des y) signifas 'kiom x, (proporcie) tiom y'. Ekzemple: "Ju pli multe, des pli bone." (= Ju pli multe, des pli bone.)

2- Ajn

La vorto **ajn** signifas 'ajn':

kiam ajn - kiam ajn

kiu ajn - kiu ajn

La adverbeca vorteto **ajn** montras emfaze nedefinitecon aŭ indiferecon. *Ajn* estas uzata ĉefe kune kun rilataj KI-vortoj, sed ankaŭ kun I-vortoj kaj ĈI-vortoj, iafoje kun NENI-vortoj. *Ajn* ĉiam staras post la koncerna tabelvorto:

- *Mi kondukos vin al ŝi, **kie ajn** ŝi estos trovebla!* Ne gravas, kie ŝi estas trovebla.
- ***Kiu ajn** ŝi estos, mi deziras al ŝi feliĉon!* Ne gravas, kiu ŝi estos.

- *Mi donis solenan promeson, ke mi silentos, ĝis mi revenos, **kiam ajn** tio ĉi fariĝos.*
- **Ĉiam ajn** vi estas bonvena ĉe mi. Venu, kiam vi volas.
- *Kial ŝi forlasis tiun lokon, en kiu ŝi havis **ian ajn** eblon, por **ion ajn** laborenspezi?*
Sen tiu loko tute mankas eblo.
- **Nenion ajn** mi diros. Absolute nenion.

Antaŭ *ajn* Zamenhof, pro influo de naciaj lingvoj, kelkfoje uzis rilatan KI-vorton, kiam pli logike estus uzi ĈI-vorton aŭ I-vorton. Se ne temas pri enkonduko de subfrazo, ĈI-vorto aŭ I-vorto estas preferinda. *Mi konsentas akcepti **kian ajn** pagon.* Pli bone: ...*ĉian ajn* pagon aŭ ...*ian ajn* pagon.

3- Prefikso "dis-" al pluraj direktoj **doni** - doni **disdoni** - disdoni

DIS = "for en malsamaj aŭ pluraj direktoj, malkunen". DIS estas uzata nur antaŭ agaj vortoj, kaj ĉiam montras manieron de la ago aŭ rezulton de la ago.

Ĉe mova vorto DIS montras, ke pluraj aferoj moviĝas for en malsamaj direktoj:

- *iri* → *disiri* = iri for en malsamaj direktoj
- *kuri* → *diskuri* = kuri for en malsamaj direktoj
- *sendado* → *dissendado* = sendado for en pluraj direktoj

Ĉe vorto, kiu jam en si mem havas ian disigan signifon, DIS plifortigas tiun signifon:

- *ŝiri* → *disŝiri* = per ŝir(ad)o dividi en pecojn
- *rompi* → *disrompi* = per romp(ad)o dividi en pecojn
- *de* → *disde* = "de" en formova aŭ malsimileca signifo (ĉi tie DIS escepte aperas antaŭ ne-aga vorto)

Ĉe vorto kun ia kuniga signifo DIS anstataŭigas la kunigan signifon per disiga. DIS tiam egalas al MAL:

- *volvi* → *disvolvi* = malvolvi
- *faldi* → *disfaldi* = malfaldi

4- sufikos "on" parto **du** - du **duono** - duono

ON = "divido". ON estas uzebla nur ĉe nombrovortoj kaj similsignifaj vortoj. Tio, kio staras antaŭ ON, ĉiam montras, per kiom oni dividas:

- *du* → *duono* = unu el du egale grandaj partoj de tuto, $\frac{1}{2}$
- *du* → *duona* = granda kiel duono, estanta duono (de io)
- *du* → *duone* = grande kiel duono, estante duono (de io)
- *dek* → *dekono* = unu el dek egale grandaj partoj de tuto, $\frac{1}{10}$
- *dek* → *dekona* = granda kiel dekono, estanta dekono (de io)
- *dek* → *dekone* = grande kiel dekono, estante dekono (de io)

Por ON-vortoj oni uzas la samajn skriboregulojn kiel por OBL.

lafoje oni konfuzas ON kun la radiko PART. Oni ne povas diri ekz. **landono** por *landparto* = "parto de lando". ON ne montras parton de tio, kio staras antaŭ ĝi, sed parton de io alia. *Triono* ne estas parto de *tri*, sed unu el tri egale grandaj partoj de io alia.

Leciono 12 - Nokta promeno



Sinjoro Pipelbom estis alta, dika peza kaj larĝa.

Tio donis al li havindan korpoforton kaj lia grandula aspekto ludis ne etan rolon en la fakto, ke la plimulto el la homoj, se ne lin timis, certe respektis kaj almenaŭ pripensis antaŭ ol decidi malkontentigi lin.

Sed tio, kio estas ofte utila dumtage, prezentas per si malplaĉan ĝenon dumnokte en loko arboplena. Ĉefe kiam oni devojiĝis kaj ekstervoje iraĉas en nehoma sovaĝejo. La dika, peza, alta, larĝa korpo ne sukcesis pasi senbrue inter la arbetoj; krome tuŝi

la naturaĵojn ĝenerale malsekajn, meze de kiuj li facile paŝis, estis travivaĵo ne malofte doloriga kaj ĉiam malagraba. Ju pli li antaŭen iris en la ĉe-kastela arbaro - des pli Adriano Pipelbom malŝatis la noktan naturon.

Viro kun okuloj, kiuj kapablis bone vidi en la mallumo, rigardis la malfacilan iron de nia industriisto. Li ridetis.

Apud tiu viro, en vestaĵo de policano, staris alia persono, en simila vestaĵo. Ĉi-lastaj estis virino.

"Ni iru", la viro diris mallaŭte en la orelon de sia kunulino. "Nun estas la ĝusta momento."

Ambaŭ paŝis direkte al la alta, larĝa, peza, dika persono. Ili zorgis fari kiel eble plej malmulte da bruoj. Junaj, facilmovaj, ili preskaŭ sukcesis.

En ĉi tiu aĉa situacio, kie arboj sovaĝe ĵetis siajn malsekajn branĉojn rekte en la vizaĝon de la industriisto, kie multpiedaj bestetoj prenis liajn piedojn por promenejo, kie naturo faligis lian piedon plej dolorige en kavon plenan de akvo aĉ-odora, Adriano Pipelbom rapide alvenis al la penso, ke oni devas ĉi tie esti preta por iu ajn malplaĉa renkonto. Ion ajn li efektive atendis, krom homa voĉo. Kiam do voĉo aŭdiĝis tuj proksime, li faris ekmiran belan surlokman salton, kiu movis lian koron, ŝajne, supren ĝis la buŝo.

"Kio?" li diris, kun la provo sensukcese rekapti iom da trankvilo.

Sed la lumo de lampeto, kiun oni direktis rekte al liaj okuloj, malhelpis la repaciĝon.

Krome, ŝajnis al li, ke la homforto, kiu tenis la lampon, surhavas vestojn policajn.

"Kion vi faras ĉi tie?" sonis la aŭtoritata voĉo.

"Mi... mi... nuuuuu... eee..." fuŝparolis Pipelbom.

"Bonvolu paroli iom pli klare" La alia diris eĉ pli grav-tone.

"Haha!" Vi promenas en la bieno de la grafino de Montokalva, meze de la nokto! Ĉu la grafino vin invitis? Ĉu ŝi scias pri via ĉeesto ĉi tie?

"N... nu.... n... ne. Mi..."

"Mi do devas peti vin min sekvi." kaj li klarigis, ke ekde la fuŝa provo kapti la grafinon fare de teroristoj la polico kontrolas atente, kio okazas en la ĉirkaŭaĵo de la kastelo.

Al la industriisto ŝajnis, ke lia koro ĉi-foje falis ĝis liaj piedoj. Li sciis, ke ne nur malfacile li povos trovi akcepteblan klarigon pri sia ĉeesto, kaj la ideo, ke la grafino ĉion scios, perdigis al li la malmulton da espero, kiu restis post la unuaj vortoj de la

policano.

(El la romano "Ili kaptis Elzan" de Claude Piron)

Parigekzerco

Via tasko estas parigi la vortojn en Esperanto (maldekstra kolumno) kun la ĝusta traduko / klarigo (dekstra kolumno) per enmeti numeron antaŭ la tradukoj / klarigoj.

Vortoj en Esperanto

	Tradukoj / Klarigoj
	<input type="text" value="3"/> pretigi <input type="text" value=""/> voltooien, bereide
1. prezentaĵo	<input type="checkbox"/> voltooien, bereiden <input type="text" value="0"/> <input type="text" value=""/> prezentajo <input type="text" value=""/> presentatie
2. aĉulo	<input type="checkbox"/> presentatie <input type="text" value="1"/> <input type="text" value=""/> aculo <input type="text" value=""/> kloodzak, misbaks
3. klarigi	<input type="checkbox"/> kloodzak, misbaksel, rotvent <input type="text" value="5"/> <input type="text" value=""/> ciu-momente <input type="text" value=""/> op ieder moment
4. pretigi	<input type="checkbox"/> op ieder moment <input type="text" value="7"/> <input type="text" value=""/> repacigi <input type="text" value=""/> zich verzoenen
5. malsaĝaĵo	<input type="checkbox"/> zich verzoenen <input type="text" value="6"/> <input type="text" value=""/> renkontigo <input type="text" value=""/> ontmoeting
6. ĉiu-momente	<input type="checkbox"/> ontmoeting <input type="text" value="4"/> <input type="text" value=""/> malsagajo <input type="text" value=""/> dwaasheid, domn
7. renkontiĝo	<input type="checkbox"/> dwaasheid, domme streek, zothed, zotternij <input type="text" value="2"/> <input type="text" value=""/> klarigi <input type="text" value=""/> verklaren
8. repaciĝi	<input type="checkbox"/> verklaren